

indekso


decembro 1972

65-a jaro

n-ro 804 (12)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



APOLLO

Testo por interpretistoj

Vi trovos

sur la sekvantaj paĝoj pli da diversspecaj artikoloj, ol ni povus ĉi tie resumi en kelkaj linioj. Permesu nur memori vin pri la 15a de decembro: Zamenhof-tago kaj, tradicie, Tago de la Esperanta Libro. Memore al la unua ni aperigas artikolon pri la naskiĝurbo de Zamenhof; por la dua ni direktas vian atenton al la recenzoj sur la paĝoj 212-213 kaj al la nova librolisto en la ĵus aperinta Dua Parto de la Jarlibro.

Enhavo

- 201 Apollo kaj la problemoj de samtempa interpretado (Duc Goninaz)
- 202 Dulingva tendenco por UN-universitatoj
- 202 Efika reklamo — Semajno de Internacia Amikeco
- 204 Traduka problemo en internacia entrepreno (Wensing)
- 205 Scienca Revuo — kaj ĝia kariero (Gjivoje)
- 206 Sciigoj de CED pri la enciklopedio
- 206 Bjalistoko (Maimon)
- 208 Kien la nederlanda lingvo en Eŭropa Komunumaro?
- 209 Dilemo por eŭropa patentoficejo
- 209 Jam kvinafoje PIF
- 210 La plano por nia laboro (Prepardiskutoj por la Tria Laborplano)
- 211 Atenton, filatelistoj!
- 211 Esperanto en radio
- 212 Ŝtelprovo malsukcesigita de lingvo-baro
- 212 Recenzoj
- 213 Laste aperis . . .
- 214 Loke — Fake — Persone
- 215 Leterkesto
- 216 TEJO-paĝo: En Karl-Marx-Stadt kaj Rethimno
- 217 Komenco bona — ĉio bona
- 218 Oficiala informilo n-ro 462

La kovrilo

En la momento de redakto la mondo atendas la lastan usonan lunvojaĝon en la serio Apollo, komencotan la 6an de decembro 1972. Inter multaj aliaj neatenditaj rezultoj de la kosmoveturado estas tiu renversiĝo de interpretistaj principoj, pri kiu raportas Michel Duc Goninaz sur la apuda paĝo. Efektive, la astronaŭtaj konversacioj estas tiel ŝarĝitaj de esoteraj kaj eksterteraj ĵargonaĵoj, por ne paroli pri la regionaj akcentoj de la astronaŭtoj mem, ke nur denaska samlingvano havas ŝancon por kompreni. Ĝis nun tio kaŭzis problemojn precipe ĉe la radio- kaj televid-stacioj alilingvaj, kiuj deziris akurate prezentadi al sia publiko la lastajn novaĵojn el la luno kaj kiuj sekve devis dependi de la servoj de fake kvalifikitaj interpretistoj — se tiaj entute estis troveblaj. Manko de interpretisto aŭ miskompreno de la astronaŭtaj vortoj eble senpaciencigis aŭ konfuzis la publikon, sed ne kaŭzis pli gravajn ĝenojn.

Novajn lingvajn problemojn levos raketoj usona kaj soveta, kiam en julio 1975 ili lanĉos komunan 48-horan kosmoflugon. Karikaturistoj en la gazetaro jam antaŭvidis la samtempan lanĉon de pli malgranda raketo kun la surskribo "interpretisto". La koncernaj aŭtoritatoj simple anoncis, ke la elektotaj 'naŭtoj (internaŭtoj?) devos flue paroli ambaŭ lingvojn. Konstatante la malsukcesojn de profesiaj interpretistoj, oni devas timi, ke la risko de miskomprenoj kaj konfuzoj restas granda kaj ke ĉi-foje la rezultoj de tiaj paneoj povus esti fatalaj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Redaktorino: A. Woessink-Nagata.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza Afriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam, Nederlando.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado kaj komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 72, Valkenswaard NB, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, Warszawa-12, Poŝkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

APOLLO KAJ LA PROBLEMOJ DE SAMTEMPA INTERPRETADO

MICHEL DUC GONINAZ

Artikolo de René Pinhas, publikigita en lasttempa numero de la revuo *Associations Internationales**, atentigas pri iuj sekvoj de la Apollo-operacioj por la teorio kaj praktiko de la samtempa interpretado. Laŭ la aŭtoro, la Apollo-flugoj konfirmis la ekziston de du problemoj, kiujn la profesiaj interpretistoj jam antaŭe konjektis.

1. La problemo de la cellingvo

Se A estas la gepatra lingvo kaj B lingvo fremda, sed perfekte regata de la interpretisto, ĉu oni devas traduki de A al B aŭ de B al A (A→B, aŭ B→A)?

Ĝis nun la okcidenta skolo konsideris sendiskuta la aserton, laŭ kiu estas preferinda B→A, dum la Moskva skolo jam de pluraj jaroj inklinis al A→B. La argumentoj favoraj al B→A estas sufiĉe konataj. Sed la Moskva skolo rimarkigis, ke ili ĉefe validas por "tekstoj kun laika terminologio, kun enhavo tre ĝenerala, kiel politikaj aŭ administraciaj paroladoj". La tradukenda teksto povas esti komprenata proksimume ("aŭdata, ne necese aŭskultata"), la fideleco tiam ne estas laŭvorta, sed la lingvaĵo de la traduko estas perfekte korekta, eleganta, eĉ bele treca.

Sed por la tekstoj sciencaj aŭ teknikaj, la tezo A→B ŝajnas pli valida: en tiaj tekstoj, ĉiu vorto devas esti perfekte aŭdata kaj komprenata de la tradukisto, kiu kapablu rekonu — kaj, okaze de misaŭdo, "re-starigi" — ĉiujn aŭdatajn fonemojn. Tion oni plej bone faras en sia propra lingvo. Tio ĉefe validas, kiam la aŭdebleco ne estas perfekta aŭ la elparolo neklara. Ekzemple, kiam la angla lingvo estas parolata de ne-angloj (nigerianoj, ĉinoj, pakistananoj k.a.), aŭ la franca de ne-francoj (senegalanoj, portugaloj, vjetnamoj...), la aŭdatan lingvaĵon plej bone kapablas kompreni denaska anglo, respektive franco.

En tiaj okazoj, A→B estas do preferinda.

Tiun duan tezon konfirmis la spertoj pri interkomunikado dum la surlunaj Apollo-operacioj. La francaj tradukistoj, ekzemple ĉe la Radio-Televido, ricevis anglalingvan "mesaĝon" malfacile komprenblan pro la malbonaj aŭdkondiĉoj. Estas evidente, ke denaska anglalingvano pli bone komprenus tian mesaĝon.

2. Disigo inter la ricevo de la mesaĝo kaj de la voĉa esprimo de ties traduko.

Ankaŭ tiu problemo fontas el la nebonaj aŭdkondiĉoj. Evidentiĝis el la Apollo-sperto, ke la tradukisto malpli bone aŭdas ol en la kutimaj konferencoj. Lia kunulo (tradukistoj kutime duopas), kiu ne devis paroli, aŭdis pli bone kaj foje "helpis" la tradukanton "per iu esprimiva mimiko, rapida kaj nelegebla noteto, mistera gesta signalo", tiel ke ŝajne praviĝis la tradicia ŝerco, laŭ kiu la tradukistoj laboras duope, "ĉar unu aŭskultas kaj la alia parolas".

3. Konklude

La ĉi-supra analizo de la artikolo de René Pinhas kondukas nin al jenaj rimarkoj:

1. La aserto, ke fremdan lingvon estas pli facile kompreni ol paroli, ne validas en ĉiuj okazoj, inter alie kiam la aŭdado estas neklara.

2. La profesiaj tradukistoj faras netan diferencon inter "sciencaj kaj teknikaj" paroladoj unuflanke, politikaj aliflanke, asimilante ĉi-lastajn al la "ĝeneralaj" paroladoj, kiuj postulas tradukon pli elegantan ol precizan. Tio ŝajne signifas,

a. ke la tradukistoj, pro multjara sperto, plene alku-timiĝis al la politika terminologio, kiu do por ili ne aspektas "faka",

b. sed ankaŭ, ke la politikaj paroladoj pli proksimas al salonaj babiladoj, bubaj kvereloj aŭ cirkaj dialogoj ol al sciencaj kolokvoj. Ili konsistigas la terenon de la retoriko. Tiam la tradukisto estas ja 'interpretisto': li devas kiel eble plej bone komprenigi la rolon de la parolanto. Tiel klariĝas la neglekto al la laŭvorta traduko.

3. La konflikto inter la du ĉi-supre aluditaj tezoj montras, ke, malgraŭ la alta nivelo atingita de la konferencaj interpretistoj, ĉi-lastaj bone konscias pri la diferenco ekzistanta inter perfekte ellernita lingvo kaj la gepatra. Ambaŭ skoloj efektive agnoskas, ke la "ideala" lingvo estas A. Homoj vere dulingvaj denaske kaj perfekte kompetentaj en ambaŭ lingvoj estas ege malmultaj. La gepatra lingvo konservas ian avantaĝon, eĉ se, por adopto de la dua solvo (A→B), la kono de la lingvo B devas esti absolute senriproĉa ankaŭ el prononca vidpunkto.

4. Kvankam la uzado de Esperanto celas forigi la interpretadon, tamen la tradukado Esperanto→nacia lingvo aŭ inverse estas kelkfoje necesa (tradukoj dum oficialaj akceptoj, esperantlingvaj prelegoj por neesperantista publiko, Londona Forumo 1971...). Tiajn tradukojn kutime faras neprofesiaj tradukantoj. Trejnado pro traduko el kaj al Esperanto ne ekzistas; sed la tradukado ĝis nun plej ofte ne estis samtempa, do ne tiel malfacila (escepte dum la plurlingvaj seminarioj de la komisiono pri eksteraj rilatoj de TEJO, ekzemple en Strasburgo 1971). Malgraŭ tiuj gravaj diferencoj, estus interese, surbaze de la ĝisnunaj spertoj — eĉ se limigitaj — pristudi la problemojn:

a. Ĉu konstateblas granda diferenco inter la t.n. "ĝeneralaj" kaj "fakaj" tekstoj en la tradukoj Esperanto→nacia lingvo aŭ inverse?

b. Ĝis kia grado la avantaĝo de la nacia lingvo konserviĝas ĉe tre spertaj esperantistoj, kaj ĉu ekzistas

* "Les répercussions scientifiques des opérations Apollo sur l'interprétation simultanée" (Associations internationales, 1972, n-ro 4, p. 244-245).

Dulingva tendenco por U.N.-universitatoj

Laŭ dokumento de la Ekonomia kaj Socia Konsilo de Unuiĝintaj Nacioj, oni pritraktas ankaŭ la lingvan problemon rilate al la UN-universitatoj.

La ĉefa starpunkto ŝajnas esti dulingvisma. Ĝi antaŭvidas la malfacilecon instrui studentojn en pli ol du lingvoj. Malgraŭ la propra konstato, ke la multeco de bazaj lingvoj postulataj por kursoj kaŭzas stagnon en universitataj studoj ĝenerale, la tiama ĝenerala sekretario de UN deklaras, ke dulingva edukado ne nur estas ebla, sed ankaŭ donas atmosferon de intelekta riĉeco. Laŭ tiu ideo, ĉiuj studentoj de UN-universitatoj devos esti kapablaj verki siajn disertaĵojn en unu el la du difinitaj lingvoj kaj ankaŭ ĉeesti kursojn faratajn en la alia lingvo. La dokumento eksplikas, ke la lingvoj konsiderotaj kiel instrulingvoj estas la ĉina, angla, franca, rusa kaj hispana, t.e. la oficialaj lingvoj de UN.

Tamen, oni samtempe atentigas, ke bazo de nur du lingvoj povus elimini multajn talentajn studentojn. Ĉar "studentoj en Latin-Ameriko povus posedi nekompletan konon de la angla aŭ franca lingvo", ĉar "studentoj el la orienta Eŭropo aŭ Sovetunio verŝajne estus en simila situacio" kaj ĉar "la samo validus ankaŭ por la granda parto de Azio", — konkludas la dokumento — "estus ne eble funkciigi pli ol du lingvojn en unu universitato" kaj "nur pro la lingva afero necesas havi *plurajn* UN-universitatojn".

Ĝi tamen rimarkas la nejustecon de dulingvismo en tia kazo, menciante, ke, "sen uzi konsiderinde pli da lingvoj ol du, UN-universitatoj povus esti rigardataj kiel praktikantaj lingvan elitismon, kiu aliflanke ĝis iu grado rezultigus elitismon en la elektado de erudiuloj kaj instruistaro".

(daŭrigo de p. 201)

konsiderinda diferenco inter denaskaj kaj nedenaskaj esperantistoj? Alie dirite, kiun formon alprenas la rilato inter A kaj B, kiam B estas Esperanto, ĉe homoj regantaj perfekte ambaŭ lingvojn?

c. Eĉ ekster la traduka problemo, ĝis kia grado esperantlingva mesaĝo restas komprenebla de sperta esperantisto aŭ restarigebla, kiam la elparolo aŭ la aŭdcirkonstancoj estas nebonaj?

Science dokumentita respondo al tiuj demandoj ebligus prilumi la karakterizojn de la ne-nacia lingvo Esperanto kaj kontroli, ĉu validas iuj epitetoj ("internacia", "helpa", "dua lingvo", "unua fremda lingvo" k.a.), per kiuj ĝiaj reklamistoj ĝin etikedas.

EFIKA REKLA

— Semajno de Inter

Certe ni ĉiuj samopinias, ke konstanta kaj prudenta informado pri la Internacia Lingvo en ĉiuj medioj estas necesa, por ke Esperanto disvastiĝu kaj venku. Ni certe ankaŭ samopinias, ke la informado devas esti vera kaj objektiva laŭ la principaro de Frostaval-len.

Sed ĉu informado sufiĉas por venkigi Esperanton? Mi pensas, ke ne. Oni tial bezonas ankaŭ propagandon. Sed propagando estas vorto, kiu ĉe multaj homoj havas malbonan sencon. Ĝi estas kvazaŭ mensa perforto, kvazaŭ devigo de la opinioj de homoj. Mi tial preferas la vorton "reklamo", vorto prenita el la fakvortaro de la komercistoj.

Kio do estas reklamo? Reklamo estas: 1) Informado en la plej konvinka formo kun la celo igi la homojn fari decidon (pri varo = aĉeti, pri Esperanto = lerni la lingvon aŭ subteni ĝin). 2) Reklamo estas ankaŭ rememorigado pri ideo aŭ nomo kun la sama celo kiel la informado. Se mi ekzemple aperigus afiŝon aŭ glumarkon kun la vorto Esperanto kaj verda stelo, tio apenaŭ estus informado sed nur reklamo. Reklamo plej efikas, se oni samtempe havas bonan informadon.

Ĉiu Esperanta societo landa aŭ loka devus ĉiujare fari laborplanon pri informado kaj reklamo. Tiu plano devus enteni ekzemple vizitojn ĉe aŭtoritatoj por informi ilin, prelegojn pri Esperanto en lernejoj kaj societoj, gazetinformadon. La reklamo ampleksas anoncojn, flugfoliojn ktp. kun invito al kursoj. La Semajno de Internacia Amikeco estas bona okazo informi pri Esperanto kaj fari reklamon por nia lingvo. Tial ĉiu Esperanto-societo jam nun preparu agadon dum la venonta SIA. Montriĝis, ke la ideo de amikeco trans limoj, de amikeco internacia, ordinare tre plaĉas ankaŭ al neesperantistoj. Urboj kaj komunumoj tial ofte kunhelpas, ankaŭ ekonomie, aranĝi feston, precipe por junularo, kun ekzemple muziko, kantado, regalo per kafo aŭ teo. Dum tiuj festoj oni kompreneble havu mallongan paroladon de eminentulo kaj mallongan prelegon pri Esperanto kaj ĝia movado. Jen nia afiŝo kun la emblemo de SIA kaj ĝia Esperanta teksto: "Amikeco trans limoj" estas reklamo. Ofte urboj aŭ komunumoj donas monon por disvastigi afiŝon kun nia emblemo, kiam ili subtenas la Semajnon.

Venontjare la Semajno estos de la 19a ĝis la 25a de februaro. Antaŭpreparu nun. Kaj ne forgesu sendi saluton al viaj Esperantaj amikoj en aliaj landoj dum la Semajno.

Erik Carlén
Komisiito por Semajno de
Internacia Amikeco

MO

nacia Amikeco

EL LA ĈI-JARA S.I.A.

Lige kun la Semajno de Internacia Amikeco (SIA) 1972 okazis pluraj aranĝoj, el kiuj kelkajn ni jam raportis ere en la aprila *Esperanto*.

Konsiderante, ke la ideo pri SIA estis lanĉita antaŭ nur 4 jaroj (unufoja SIA en 1969), oni povas konstati la ne-malrapidan evoluon de la Semajno. Oni ne restis nur ĉe la interŝanĝado de salutkartoj, sed disvolvis la idearon pri festo-manieroj, — idearon, kiu espereble ankoraŭ senĉese disvolviĝos pere de niaj elpensemaj membroj.

La aranĝojn de SIA 1972, kiujn oni raportis al ni sistempe, ni povas klasifiki en la kategoriojn Esperanto-kluban, fakan, enlandan kaj internacian. Kompare kun la aranĝoj destinitaj nur al kluboj, la lastaj 3 kategorioj estas evidente pli valoraj en la informado. Ni supraĵe vidu, kiel oni faris.

Fake

Dum la publika prezentado de sciencaj filmoj el diversaj landoj, okazinta en Bruselo (Belgujo), oni kaptis la okazon atentigi pri la lingva diverseco, kiu malhelpas la proksimiĝon de la popoloj.

En la religia medio, estis ekzemple prelego en Esperanto-klubo (Valladolid, Hispanujo) pri "vera amikeco" fare de neesperantista pastro, al kiu la klubo donacis gramatikon de Esperanto, estis predikoj en preĝejoj pri amikeco kaj la Internacia Lingvo (Kalmthout, Belgujo), aperis artikolo pri SIA en katolika gazeto de Aŭstrujo ... ktp.

Bona ekzemplo estas en la edukado. La belga ministro pri edukado jam regule sendigas cirkuleron al ĉiuj lernejoj de la subdepartemento de Antverpeno, en kiu li petas atenton pri SIA kaj en kiu li permesas, ke dum lecionoj de moralo aŭ religio la temo estu pritraktata. En la teksto de la cirkulero troviĝas kelkaj gvidideoj por tiu leciono, i.a. ke la Internacia Lingvo Esperanto povus multe kontribui al internacia amikeco.

Krom en la scienca, religia kaj eduka fakoj, estis naturamika kaj turista aranĝoj, kiujn oni ne detale raportis. En diversaj fakoj restas ankoraŭ senfinaj eblecoj aranĝi ion lige kun SIA.

Ĝenerale: enlande kaj internacie

Por ne-esperantistaj publikoj oni diversloke festis la SIA, ekz-e per folkloraj dancoj (Belgujo), aŭdigo de diskoj el diversaj landoj (Hispanujo).



Flirtis verda standardo inter la usonaj en la avenuo Michigan en Ĉikago, kiu ĉi-jare oficiale proklamis la Semajnon de Internacia Amikeco.

Por efike penetri en internaciajn mediojn, esperantistoj en Vieno (Aŭstrujo) invitis eksterlandanojn el Aŭstra-Aŭstralia Societo kaj Aŭstra-Bulgara Societo. En tia kunveno estas ne malfacile organizi paroladon de ambasado, kiel tiu de s-ro R. Harry, aŭstralia ambasadoro en Bonn (F.R. Germanujo).

Ni lernu ankaŭ el plia ekzemplo viena. Esperantistoj en Vieno kontaktis ankaŭ kun tiea Societo de Internacia Kompreniĝo tiel efike, ke ĝi mem nun regule informas oficialajn instancojn pri SIA.

Inter la aferoj fareblaj en preskaŭ ĉiuj grandaj urboj troviĝas: inviti alilandajn studentojn al SIA-aranĝaĵo. En Pécs (Hungarujo) altlernejaj kaj universitataj studentoj el eksterlando estis invititaj al la SIA-vespero, en kiu kun la reprezentiĝo de la urbo estis prelego, kantado, muziko, deklamoj fare de studentoj, antaŭ 200 personoj, kiuj poste dancadis ĝis matene.

Unu el la komunaj trajtoj de tiaj aranĝoj en diversaj landoj estis disaŭdigo de la disko "Donu al mi vian manon, amiko" (kanto kaj komponaĵo de Ramona van Dalsem).

Evidentiĝis ĉi-jare alia karakterizaĵo: ke oficialaj instancoj, kiel grandaj urboj kun multe da eksterlandaj turistoj kaj laboristoj, povas relative rapide turni sian atenton al la graveco de la internacia interkompreno kaj havas potencialon agnoski aŭ partopreni la SIA. Kiel raportite en la aprila *Esperanto*, la usona urbo Ĉikago oficiale proklamis la Semajnon, flirtigante la verdan standardon en la centro de la urbo. Baldaŭ sekvis same Sanfrancisko, krom la urboj Tampa kaj St. Petersburg (ambaŭ Florido, Usono).

Por forbalai iajn skeptikajn pensojn pri la efikeco de SIA, ni citu vortojn de Roman Pucinski, usona senatano, el lia parolado direktita al la Esperanto-Societo de Ĉikago dum la ĉi-jara SIA: "Kiam ni parolas pri homgrupo, kiu havas grandan esperon kaj klopodas trovi ian longedaŭran pacon en la mondo, ni devas meti la esperantistojn en la unuan lokon de la listo, simple ĉar ili entreprenas ion tre signifan kaj ion celplenan".

(Redakcio)

TRADUKA PROBLEMO EN INTERNACIA ENTREPRENO



Dumtraduka konferenco: De maldekstre s-roj Luton, Schneider, Scholz kaj v.d. Weijden.

E.L.M. WENSING

En la tradukado de la jarraporto de Philips (nederlanda entrepreno) jam dum kelkaj jaroj prezentiĝas kurioza kaj origine tute neatendita kromaĵo. Montriĝis necese fari du anglajn versiojn, unu por angloj, alian por usonanoj. Multegaj nocioj kaj terminoj, fakaj kaj komunaj, funde malsamas en la du lingvoj. "Stocks" (stokoj) en la brita versio fariĝas "inventories" (inventaroj) en la usona. La anglaj vortoj "ordinary shares" (ordinaraj akcioj) tradukiĝas usonlingve per „common stock”.

Opinioj de la faktradukistoj

“La ĉi-jara raporto estis eksterordinare malfacilega”, diris s-ro Luton, la gruestro de la angla traduksekcio, kiu respondecas pri ambaŭ tradukoj (angla kaj usona). “Precipe la fakto, ke daŭre pli diverĝadas la du lingvoj, kaŭzas neimagitajn problemojn”.

S-ro Schneider, faktradukisto por la germana lingvo, komentis: “Min alfrontas grava problemoj, specifa por la germanlingva versio. Ĝi estas la ŝajna simileco inter la nederlanda kaj la germana lingvoj. Multaj opinias, ke eblas traduki preskaŭ laŭlitere el la nederlanda en la germanan, pensante, ke tiel estiĝas klara, nemiskomprenebla traduko. Mia plej granda problemoj estas konvinki miajn nederlandajn kolegojn, ke tiel oni ne povas labori. En pluraj kazoj, la tradukisto devas vaste devii de la originala teksto. Persone mi kredas, ke pli facilas traduki la raporton el la nederlanda en la francan ol en la germanan lingvon pro la menciita kvazaŭ-simileco. Tradukante en lingvon de tute diferenca strukturo, oni ĝenerale renkontas malpli da problemoj. Malgraŭ ke ekzistas nuancaj diferencoj en la aŭstra kaj svisa germanaj lingvoj, ni produktas nur unu germanlingvan version de la jarraporto”.

S-ro Van der Weyden, ĉefo de la franclingva sekcio de la tradukoficejo, diris: “Jam ekde 1961 mi okupiĝas ĉiujare pri la traduko en la francan de la ampleksa jarraporto. Necesas esti ia speco de ĉiufakulo posedanta vastajn konojn pri plej diverĝaj kampoj de tekniko kaj komerco. Takto estas esenca faktoro en nia profesia laboro, ĉar ĉiam

oni bezonas kontentigi du partiojn, la superan direktaron en Nederlando kaj niajn kolegojn en Francujo. Tiu takto estas bezonata precipe kiam temas pri tradukoj en la francan de pluraj nocioj kaj terminoj, ne havantaj klaran ekvivalenton en la alia lingvo. Por menci ekzemplon, la angla *Defence Systems* ne tradukeblas en la franca per *Systèmes de Défense*. Ĉar la franca estas la perfekta tipo de analiza lingvo, tiaj tradukproblemoj prezentiĝas pli ofte en tradukoj el la nederlanda en la francan ol en tiuj el la nederlanda en aliajn lingvojn. Multaj teknikaj esprimoj en la angla kaj germana pli malpli proksimiĝas al samsencaj kaj samenhavaj nocioj en la nederlanda. Jen alia kialo, kiu komplikas la franclingvan tradukon. Priskribante novajn produktojn kaj novajn teknikajn inventojn, ellaboritajn en niaj laboratorioj post la apero de la antaŭa jarraporto, mi respondecas pri absolute korekta frazeologio unusenca. Plue, oni ne pretervidu, ke multaj nocioj kaj terminoj uzataj de Philips, tute ne troveblas en specifaj fakvortaroj”.

La multlingveco multekosta kaj temporaba

Ĉiu unuopulo en la grupo de tradukistoj, respondecas pri la fina versio de la jarraporto en la franca, germana, hispana, angla, usona kaj nederlanda lingvoj, dufoje dum la raporta jaro vizitas la koncernan landon, antaŭpreparante ĝian tradukon. Ĝis la plej lasta momento juristoj kaj financekspertoj en la koncernaj landoj gvas kaj pesadas ĉiun vorton. Diras s-ro Van der Weyden: “Estas klare, ke dum nia laboro ni tute familiariĝas kun la kompleta enhavo de la raporto. Kiam fine okazas la akciula jarasembleo, nia fina tasko de samtempa interpretado ne plu prezentas menciindajn problemojn”.

La jarraporto de Philips aperas en eldonkvanto de proksimume 90 000 ekzempleroj, en 6 malsamaj lingvoj. La raporto ampleksas ĉirkaŭ 90 paĝojn de formato 21 x 28,5 cm.

Grupo de elstare kompetentaj tradukistoj laboradas super ĝi la pli grandan parton de la jaro. Kaj malgraŭ ĉio ĉi, la industria mondo fakte elspezas neniom por solvi aŭ eĉ faciligi la urĝan problemon de la plurlingveco.

SCIENCA REVUO

— kaj ĝia
kariero



Profesoro Popović kaj lia revuo

MARINKO GJIVOJE

Kiam oni valortaksas iun atingiĝon elbatalitan dum jardekoj, oni kutimas unue provpeni ĵeti retrorigardon por vidigi la trapasitan vojon kaj la meritulojn, kiuj helpis trableĉi ĝin. Mia intenco estas prezenti al vi *Scienca revuo*. Jen unufaze la komenco de ĝia historio: post unuaj eksvingoj, pliĝustadire aperoj de kelkaj sciencaj periodaĵoj, el kiuj la plej menciindaj estas *Internacia scienca revuo* (aperadis jam ekde la jaro 1904, 8 grandformataj volumoj kun pli ol 4000 paĝoj) kaj Bulteno de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE; ekde la jaro 1926 ĝis la Dua Mondomilito) — en la jaro 1949 ekaperis *Scienca revuo* (SR). Pro limigita spaco mia nuna intenco ne estas revui la revuojn kaj la Esperanto-pionirojn, kiuj dum la lastaj 70 jaroj kontribuis en ili.

SR aperadas pli malpli regule, komence eldonite de privata eldonisto J. Muusses en Nederlando ĝis la jaro 1961, kiam, post unujara paŭzo, ĝian aperigadon transprenis ISAE mem. Redaktata kaj presata en Jugoslavio ekde la jaro 1962, ĝi iom post iom plifortiĝis tiel, ke post 3-4 jaroj oni likvidis la malfruon. Per sistema zorgado pri la abonantaro, per iompost-ioma reguligo en la aperado, dank'al streĉopenoj de pluraj fervoraj diverslandaj delegitoj, la nombro de la abonantoj kreskis de iomete pli ol 200 al nunaj 600. Siatempe la tiama ĝenerala sekretario de ISAE — la nuna prezidanto kaj ĉefredaktoro — mem montris ekzemplon sekvotan: dum kvar jaroj li sukcesis, kun helpo de aliaj ISAE-anoj, kreskigi en Jugoslavio la abonantaro de 5 al 40!

Komence mankis la mono eĉ por la nuraj preskostoj en plej malmultekostaj presejoj; la ŝuldo atingis en unu momento 20 000 stelojn, sed poste dekreskis, tiel ke nun ĝi estas likvidita.

Pli ofta kaj pli granda

Ĉio menciita kaj precipe publikigado de ĉiam pli bonkvalitaj kaj altnivelaj sed facile legeblaj artikoloj ebligis, ke de 4-foja aperado en la jaro po maksimume 40 paĝoj en la formato A 5 oni transiru al aperado 6-foje jare en formato B 5 kun minimume 32 sed regule pli da paĝoj. Same kiel matematiko-astronomio — la fakoj de la prezidanto de ISAE kaj redaktoro de SR — ne staras surloke kiel teoria afero, sed eniras la vivon de ĉiuj, same tiel "nia afero" marŝas antaŭen sub lerta givdado de d-ro Boĵa Popović, kiu

estas ankaŭ la prezidanto de JEF — jugoslavia landa Esperanto-organizaĵo.

Malgraŭ kelkfojaj alilokiĝoj dum la lastaj dudek jaroj, malgraŭ surdorsiĝintaj 60 jaroj (jes, lastatempe Popović festis sian 60-an naskiĝtagon), li persistas en sia fruktodona aktiveco. Problemoj? Sen problemoj ne eblas, sed eblas ankaŭ solvi ilin!

Iam la artikolujn de la ĉefredaktoro Popović malpleniĝadis post la apero de ĉiu numero de SR, kaj nun tamen ĉiam ekzistas en ĝi iu rezervo de artikoloj kun tia kvalito, ke oni povas ion elekti. Pluraj sciencistoj ne scias perfekte Esperanton, kaj ili rifuzas verki ion por SR, se oni tro postulas de ili lingvaflanke. Sed la revuo klopodas zorgi pli multe pri scienca enhavo ol pri la lingvaĵo, kun liberemo en la postulado de lingva perfekteco. Por eviti multajn diskutojn — diris al mi prof. Popović — ni starigis por la lingva kontrolado la principon: korekti nur tion, kio estas erara laŭ ĝenerale akceptitaj reguloj kaj fari nur tiajn stilajn ŝanĝojn, kiuj facile plibeligas la frazon. Tia principo fariĝis ĝenerale agnoskita de la legantoj de SR, kvankam de tempo al tempo aperas la kritikantoj de la lingvaĵo de SR. Al tiuj oni kutime respondas: ni ne povas ŝanĝi la fiksitajn starpunkton, sed ni volonte akceptos similajn artikolojn verkitajn de pli bonaj lingvokonantoj.

Por stimuli verkadon de originalaj kaj popularsciencaj artikoloj el ĉiuj branĉoj, kiuj plialtigus la reputacion de SR, prof. Popović trovis oportuna starigi je dispono la monsumon de sesmil steloj ("premio Popović"), kiu estos aljuĝita por la plej bona artikolo en 1970-1972. Tio kaj la honorariado de la aŭtoroj (la honorarioj povas esti utiligataj por pagado de kotizoj, aldonaj ekzempleroj kaj represajoj) sendube ne nur stimulos la ĝisnunajn kunlaborantojn sed vekos certe ankaŭ la novajn.

Je la fino, kion ekdeziri al la SR kaj ĝia redaktoro? Ke la nombro de abonantoj plialtiĝu de 600 al 1000 (la novaj abonantoj ne estu nur fakuloj sed ankaŭ aliaj homoj, kiuj sekvas sian epokon); ke la ĉefredaktoro havu la forton por ankoraŭ longe redakti la revuon; ke daŭre atingu lin diversstemaj altnivelaj sciencaj artikoloj, kiuj vaste rigardas problemojn, el la plumo de malnovaj kaj novaj kunlaborantoj. Kaj ĉio tio estas, kredu min, realigebla kun ioma helpo de ni ĉiuj.

Sciigoj de CED pri la enciklopedio

La preparoj por nova eldono de *Enciklopedio de Esperanto*, aperonta ĉe J. Régulo sub la aŭspicio de CED, plue daŭras, kvankam pro la amplekso de la laboro baldaŭa apero ne estas verŝajna. Tamen, estas unu el la principoj de la redaktoroj ne simple konservi ricevitaĵajn manuskriptojn ĝis la finpretigo de la tuta verko, sed konatigi al la publiko jam nun la plej gravajn esplor-rezultojn.

Jen superrigardo pri la ĝis nun farita laboro:

1. La plej grava frukto de la ĝisnuna redakta laboro en ligo kun la Enciklopedio estas la dua, konsiderinde pliampleksigita eldono de la verko *La Internacia Lingvo – Faktoj pri Esperanto* (1954)*, kiun denove redaktis prof. d-ro Ivo Lapenna, ĉi-foje kunlabore kun Tazio Carlevaro kaj Ulrich Lins, kaj al kiu kontribuis sesdeko da kunlaborantoj de la Enciklopedio. La verko, kiu estas nun kompostata, estos la plej detala kompendio pri Esperanto aperinta post la budapeŝta Enciklopedio kaj sendube forigas mankon delonge sentatan de ĉiuj, kiuj por informiĝado pri la bazaj faktoj de la movado kaj literaturo de Esperanto serĉadis fidindan gvidilon.

2. Notindaj estas la bibliografiaj laboroj de Reinhard Haupenthal, kiu kompilis katalogon de la tuta interlingvistika literaturo en la bibliotekoj de FR Germanujo kaj bibliografion de Volapük. Ambaŭ verkoj estas pretaj, kaj nuntempe okazas intertraktadoj pri eldono. Krome, laŭ lia iniciato, germana eldonejo decidis represi la delonge elĉerpitan *Bibliografio de Internacia Lingvo* de P. E. Stojan.

3. Pluraj kontribuajtoj, verkitaj por la Enciklopedio, aperis kaj aperos anticipe en diversaj revuoj, ekz., pri la Esperanta Biblio (de George Rust) en *Biblia Revuo*, pri la ĉina lingvo (de David Jordan) en *Oomoto*, pri Comenius (de V. Novobilský) en CED-Dokumentoj, pri persekutoj kontraŭ Esperanto (de U. Lins) en *L'omnibuso*, pri interlingvistiko (de Carlevaro resp. Haupenthal) en *Linguistische Berichte*. Aliaj studoj de kunlaborantoj de la Enciklopedio aperis i.a. en *Esperanto*, *Germana Esperanto-revuo*, *La revuo orienta*, *Svisa espero* kaj *Kontakto*.

4. Dum la lastaj jaroj plimultiĝis studoj pri specialaj temoj, ne nur literaturaj, sed ankaŭ movad-historiaj. Se tiu tendenco daŭros, tio multe akcelus la plian preparlaboron por la Enciklopedio. Kiel imitindajn

* La nova verko estos volumo de preskaŭ 600 paĝoj, t.e. proks-e trioblo de "La Internacia Lingvo: Faktoj pri Esperanto". Ankaŭ la enhavo estas ne nur komplete reviziita, sed ankaŭ vastigita al konsiderinda nombro da faktoj kaj demandoj, ne tuŝitaj en la antaŭa libro. Ĉar temas, efektive, pri esence nova verko, ankaŭ la titolo kredeble estos alia, plej verŝajne: "Esperanto en perspektivo – Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo".

BJALIS- TOKO



N. Z. MAIMON

La materialoj jam verkitaj por la estonta nova Enciklopedio de Esperanto prezentas abunde da trafaj analizoj kaj sorĉe interesaj faktoj. Ĉi tie ni publikigas, specimene, artikolon el tiuj materialoj, verkitan de unu el niaj plej elstaraj zamenhofologoj, N.Z. Maimon.

Białystok (Esperante Bjalistoko, ruse Bjełostok), urbo en la pola parto de Litovujo, kie Zamenhof naskiĝis kaj pasigis la jarojn de sia infaneco, 1859-1873. La naskiĝdomo staris en la juda kvartalo, en strato nomata Jatke-Gas (jidlingve: strato de la viandbutikoj), ekde 1919 Ulica Zamenhofa (pole: Zamenhof-strato). La domo staras ankoraŭ nun, sed izole; ĉiuj aliaj en tiu strato malaperis. Ĝi estas la sola domo en la tuta Zamenhof-strato.

La historio de tiu loko reiras al la 14a jarcento. Ĝia nomo ekestis per kunligado de du vortoj: "Bialy" (la "Blanka" – la rivereto, kiu fluas en ĝi) kaj "stok" (la arbara monteto, kiu ĝin ĉirkaŭas). Post 500-jara ekzistado ĝi fariĝis industria urbo; malgraŭ tio ĝi ne malbeliĝis, ĉar la du naturaj apartaĵoj, ĵus menciitaj, donas al ĝi plaĉan aspekton, mildigante la unutonecon de la ĉiutaga industria vivo. Interesajn historiajn

ni menciui, ekz., la bibliografion de religia literaturo en Esperanto de K.O. Sandgren, la historion de la bulgara movado de Ivan Sarafov kaj la studojn faratajn en Japanujo kaj GDR. Surbaze de sia ampleksa sliparo, la redaktoroj plurfoje povis doni helpon al esplorantoj, ankaŭ ekster la movado.

5. Laŭ la deziro de la redaktoroj, la Landaj Asocioj nomu unu personon aŭ komitaton, kiu prizorgu por la Enciklopedio la partojn rilatajn al la koncerna ŝtato. Pli-malpli kontentige prizorgataj estas ĝis nun nur Argentino, Belgujo, Britujo, Bulgarujo, Finnlando, Francujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Japanujo, Nederlando, Pollando, Sudafriko kaj Vjetnamujo. Ni petas, ke ankaŭ la ceteraj Landaj Asocioj



Stacidomo de Bjalistoko

allogaĵojn la urbo ne posedas, sed ĝi ĝuas la reputacion kiel naskiĝloko de Zamenhof.

Kvin periodojn oni distingas en ĝia historio:

- 1) litova periodo 1320 – 1665,
- 2) Branicki-periodo 1665 – 1795,
- 3) prusa periodo 1795 – 1807,
- 4) rusa periodo 1807 – 1915,
- 5) pola periodo ekde 1919.

Fondita de la litva duko Gedimin en la jaro 1320 kiel eta vilaĝo, ĝi transiris en 1665 en la posedon de la nobela pola familio Branicki, kaj tiam komenciĝis ĝia disvolviĝo. En 1742 ĝi fariĝis urbo, kaj ĉirkaŭ tiu tempo – laŭ buŝa tradicio – grafo Branicki invitis judojn, ke ili tie ekloĝu. Forta puŝo antaŭen okazis en 1835 kun fondiĝo de la unuaj teksfabrikoj. De post tiam ĝi daŭre evoluadis, kaj la loĝantaro ĉiujare pligrandiĝis. En decembro 1859, kiam Zamenhof naskiĝis, Bjalistoko jam estis mezgranda industria urbo. Laŭ statistiko el la jaro 1860 ĝi enhavis 16 544 loĝantojn, el kiuj 11 288 estis judoj (68,3%). Estante la granda plimulto, la judoj donis al la urbo la dominan noton. Estis ĉefe ili, kiuj iniciatis kaj evoluigis tiun fortan industrion. La rusa registaro rigardis Bjalistokon kiel unuan stacion ekster la limoj de la pola teritorio, pro tio, ĝi favoris ĝian industrion kaj

subtenis ĝin kontraŭ tiu de Lodz, precipe post la pola ribelo en 1863. En 1859 oni inaŭguris la fervojon Varsovio-Peterburgo, kiu trapasis Bjalistokon, kaj en 1867 estis konstruita nova fervoja linio: Bjalistoko – Brest-Litovsk. La urbo floradis. Ĝi fariĝis granda komerca kaj industria centro de teksaĵoj, tria post Moskvo kaj Lodz.

Korespondaĵo el la jaro 1863 priskribas la tiaman staton de la ekonomio: “Pogranda komerco floradas en Bjalistoko, kaj ega aktiveco regas en ĉiuj branĉoj de la ekonomio. Teksfabrikoj, movataj per vaporo, fondiĝis kaj fortikiĝis, dum la vapormaŝino estis ankoraŭ raraĵo en Rusujo. En la regiono de Bjalistoko kaj Bielsk ekzistas nuntempe pli ol 30 grandaj fabrikoj; ili ĉiuj estas forte ligitaj kun Bjalistoko, kaj la plej grandaj fabrikoj troviĝas fakte en la urbo mem. Ili prilaboras lanaĵojn kaj aliajn ŝtofojn laŭ valoro de 5 000 000 da rubloj ĉiujare. 90% de la fabrikantoj kaj komercantoj estas judoj. Kaj kune kun la plimultiĝo de la fabrikoj pligrandiĝis la urbo. Ĝi akiris famon kaj ĉiujare la loĝantaro grandiĝas”. (*Hakarmel*, hebrea semajna gazeto, Vilno, 1863:49; kp. *La nica literatura revuo* 5. 1959/60: 30,201.)

Dum la postaj jaroj la evoluo ne haltis kaj la loĝantaro pli kaj pli grandiĝis. En 1895 enestis 62 993, inter ili judoj 47 783 (76%). Poste la juda loĝantaro laŭprocente malpliigis, tamen restis ĉiam la plimulto. En 1932 enestis 91 207 loĝantoj, judoj inter ili pli ol 50 000. La nejudaj loĝantoj ne estis homogenaj. Ĝi konsistis el poloj, rusoj, germanoj, litovoj, tataroj – dividitaj inter si per lingvaj kaj religiaj baroj. Ekzistis fremdeco inter la diversaj elementoj de la loĝantaro, kaj la intergentaj rilatoj estis neamikaj – faktoro, kiu forte impresis la junan Zamenhof kaj donis la direkton al ĉiuj liaj estontaj celadoj.


Bjalistoko vidis ankaŭ tempojn malfacilajn. En 1812 trafis ĝin la granda Napoleona milito, kaj, kvankam la batalejo estis malproksima, la urbo sentis la militon. En 1830-31 estis la unua pola ribelo, kiu havis malbonan efikon je ĝia ekonomio. Ankoraŭ pli malbone efikis la dua ribelo, en 1863. Ĝi tuŝis la urbon rekte, ĉar preskaŭ la tuta milito havis lokon en tiu regiono kaj pluraj sangaj bataloj okazis en ĝia ĉirkaŭaĵo; tamen la urbo mem ne suferis, pro la forta garnizono, kiu enestis en ĝi. Poste venis la unua mondmilito kun siaj mizeroj, kaj venis la dua – kun siaj nekredeblaj kruelaĵoj. [→ p. 208]

Strato Zamenhof en Bjalistoko



proponu al ni kompetentajn kunlaborantojn. Pri ĝeneralaj aferoj kaj pri temoj rilataj al la historio de la movado oni bv. korespondi kun Ulrich Lins (Gemarkenstr. 146, D-5 Köln 80); pri temoj rilataj al lingvo kaj literaturo, kun Reinhard Haupenthal (Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler); ambaŭ en FR Germanujo.

6. Ni memorigas, ke UEA starigis Fondaĵon “Enciklopedio”. Per donacoj al ĝi oni povas konsiderinde akceli la preparojn, ĉar ĝis nun la redaktoroj ofte dum multaj monatoj ne ricevis repagon de siaj afrank-elspezoj, kio neeviteble bremsas la laboron. Kontribuaĵojn oni povas sendi al la Centra Oficejo aŭ al la Landaj Perantoj de UEA.



Naskiĝdomo de Zamenhof

[daŭrigo de p. 207]

La judoj havis sian apartan sorton. En julio 1905 okazis unua pogromo, farita de soldatoj, ĉe kiu 25 judoj estis mortpafitaj. Dua, pli terura pogromo okazis komence de junio 1906 kaj daŭris 2-3 tagojn: aliĝinta popolamaso atakis judojn, murdis, vundis kaj rabis; ankaŭ soldatoj partoprenis — 80 estis murditaj, pli ol 80 vunditaj. Zamenhof, en letero al Javal, menciis tiun "teruran kaj senekzemplan buĉadon" (*Leteroj de Zamenhof 1*, p. 271), kaj pli detale en sia kongresa parolado en Ĝenevo (*Originala verkaro*, p. 370). Sed tiuj du okazaĵoj paliĝas kontraŭ tio, kio venis 35 jarojn poste, en 1941, kiam germanaj trupoj konkeris la urbon kaj turnis sin kontraŭ la judoj kun neimagebla teruro. Preludo okazis tuj: pli ol 2 000 viroj estis kolektitaj kune en unu sinagogon, enŝlositaj kaj per fajro forbruligitaj. Post tio ili ĵetis sin kiel sovaĝaj bestoj sur la ceterajn, murdante virojn, virinojn kaj — suĉinfanojn en iliaj luliloj. Sekvis aliaj sennombraj kruelaĵoj, unu pli terura ol la antaŭa, ĝis fine ĉiuj judoj de Bjalistoko — ĉirkaŭ 60 000 — estis ekstermitaj. Restis en la urbo nur du silentaj atestantoj: la malnova juda tombejo, kaj la nova — la geto-tombejo*.

La juda karaktero de Bjalistoko jam ne ekzistas. Tiu medio tute malaperis. Sed iam — meze de la 19a jarcento kaj plue — vigla juda vivado pulsadis en la urbo. La materia stato estis bona, pli ol ie en Litovujo. La intelekta vivo ankaŭ floradis. Sed la intergentaj rilatoj restis malbonaj, eĉ malamikaj. Kaj ĝuste tiu negativa atmosfero de Bjalistoko turmentis la animon de la juna knabo Zamenhof, instigante lin krei dum postaj jaroj la komunan, internacian lingvon.

* geto = kvartalo en urbo, kie judoj devis loĝi laŭ ordono de magistrato. (Red.)

KIEN LA NEDERLANDA LINGVO EN EUROPA KOMUNUMARO?

Kvin membroj de Eŭropa Parlamento, suborgano de Eŭropa Komunumaro (= Eŭropa Ekonomia Komunumo + Eŭropa Karba kaj Ŝtala Komunumo + Eŭropa Atomenergia Komunumo) lastatempe faris jenajn demandojn al la Komisiono de Eŭropa Komunumaro rilate al la lingvouzado en la Komunumoj.

Du el la 5 parlamentanoj estas el Belgujo (s-roj Vandewiele kaj Vermeylen) kaj la ceteraj 3 estas el Nederlando (s-roj Baas, Bos kaj Broeks).

1) Ĉu la Komisiono scias ke, en la Oficejo por la Statistiko de la Eŭropa Komunumaro ekzistas la intenco forte limigi la uzadon de la nederlanda lingvo en publikaĵoj?

2) Ĉu la Komisiono ĉirilate povas konfirmi, ke en nur franclingva noto, aperinta en junio 1972, la suprenomita Oficejo devige preskribas, ke, ekde la 1a de januaro 1973, la publikaĵoj aperu en nur 4 lingvoj, eliminante la nederlandan, aŭ eĉ en nur 2 lingvoj, krome eliminante la germanan kaj italan lingvojn? Estas memoriginde, ke ĝis nun la nederlanda kaj la aliaj lingvoj en la statistikaj publikaĵoj de la Komisiono estis pritraktataj kiel egalrajtaj.

3) Ĉu la Komisiono konscias, ke laŭ tiu maniero, rilate la nederlandan lingvon, al popologrupo de 18 000 000 da homoj la informado en ilia lingvo estos detenata?

4) Ĉu la Komisiono povas konfirmi, ke ekde la 1a de januaro 1973 ĉe la suprenomita Oficejo, por la nomado de internaciaj organizaĵoj, praktike nur la franclingvaj mallongigoj estos permesataj (AELE, AME, FMI ktp.) kaj ke tio ankaŭ koncernos ĉiajn aliajn mallongigojn (AT, AM, A, CIV ktp.)?

5) Ĉu la Komisiono povas sciigi ankaŭ, ĉu oni ĉe aliaj instancoj de la Komunumoj proklamis aŭ preparas kompareblajn preskribojn?

6) Ĉu la Komisiono konsentas kun la demandantoj, ke la facila alireblo de publikaĵoj de la Eŭropa Komunumaro por la enloĝantoj de ĉiuj ŝtatoj-membroj estas tiel grandsignifa, ke oni krome akceptu eventualajn teknikajn komplikaĵojn, kaj ĉu ĝi tial pretas prizorgi, ke preskriboj, kiuj kontraŭas tion, estos nuligitaj?

DILEMO POR EŬROPA PATENTOFICEJO

Lingvaj konsideroj ludas gravegan rolon en la elekto de la sidejo de la nova Tuteŭropa Patentoficejo. "Konvencion, kiu starigos eŭropan sistemon de patentoj" prilaboras interregistara konferenco de 19 landoj. La konferenco jam decidis, ke estus plej konvene havi nur unu centran oficejon por administri la sistemon, kaj nun alfrontas la taskon decidi, kiu urbo el tiuj proponitaj — Munkeno, Luksemburgo, Hago kaj Londono — estos la plej taŭga.

La laboro de la oficejo devas esti farata, laŭeble, je malalta kosto. Oni antaŭvidas, ke 65 procentoj de la laboro de la oficejo estos farataj en la angla lingvo, 25 procentoj en la franca, kaj 15 procentoj en la germana. Ĉi tiu diverseco kaŭzas problemojn rilate tradukojn kaj dungadon de la laborfortoj. Trilingva personaro estus tro multekosta, do oni devas atingi kombinon de unu-, du- kaj trilingvuloj por fari la laboron je minimuma kosto. Krom tio, la laboro devas esti farata sufiĉe rapide, por ke la industrioj povu tuj informiĝi. Ĉi tiu rapideco dependas de la rapideco de la ekzamenistoj de patentoj, kiu siavice dependas de ilia nivelo de lingvoscio. Aldone, tra-

dukoj devas esti kiel eble plej fidelaj, laŭ la diversaj formoj uzataj en la diversaj nacioj. Ĉi tiujn praktikajn konsiderojn distordas tio, ke la elekto de la sidejo de la Patentoficejo envolvus nacian prestiĝon, kaj naciaj registaroj kaj aliaj organizaĵoj faras premion por influi la decidon de la Konferenco.

Tri urboj estas seriozaj kandidatoj por fariĝi la sidejo de la Oficejo: Hago, Londono kaj Munkeno.


La kandidateco de Hago estas subtenata de la patent-agenta profesio, la nederlanda komercistaro kaj la nederlanda registaro. La proponantoj de Hago argumentas, ke la urbo estas libera je potencpolitikaj premoj, do taŭga por neŭtrala internacia organizaĵo. Laŭ ili, la fakto, ke la nederlanda ne estos labora lingvo, estas eĉ avantaĝo.

Ĉe la proponantoj de Londono kiel sidejo de la organizaĵo, la lingva demando superregas. La funkciado de la oficejo en Londono estus pli malmultekosta, ĉar ĉiuokaze, laŭ proponita kvota sistemo, angleparolantoj estos la plejmulto, kaj en Londono ne estus necese pagi specialan 30% kromsalajron por ili. La laboro estus ankaŭ pli rapida, ĉar Londono estas komunika centro, kaj la oficistoj laboros plejparte en sia gepatra lingvo. Pro tio ankaŭ ne estus eblo de konflikto inter la laborantoj kaj la ĉirkaŭanta loĝantaro.

La registaro de F.R. Germanujo forte subtenas la proponon de Munkeno kiel estonta sidejo de la Patentoficejo, eĉ eldoninte broŝuron, kiu prezentas la kulturajn allogaĵojn de Munkeno, kaj indikas, ke la Konferenco preskaŭ definitive decidis favore al la bavara urbo.

La rezultoj de ĉi tiu konkurenco estos sciataj nur en 1973, kiam la Konferenco prezentos proponon pri traktato al Diplomacia Konferenco, kiu starigos la Eŭropan Patentan Sistemon.

JAM KVINAFOJE P.I.F.



De la 30a de septembro ĝis la 7a de oktobro 1972 okazis la 5a Pupteatra Internacia Festivalo, kiun organizis la Internacia Kultura Servo Zagreb kaj Pionira Domo Sisak, ambaŭ en Jugoslavio. Al la festivalo partoprenis 11 pupteatroj el 8 landoj: Soveta Unio, Hindujo, Britujo, Rumanujo, Ĉeĥoslovakujo, Pollando, Bulgarujo kaj Jugoslavio. La festivalo okazis dum 8 tagoj en Zagreb kaj Sisak.

La lingvo de la prezentaĵoj kaj la reciproka komunikado estis Esperanto. La ĉi-jara festivalo estis plia kontribuo al firmiĝo de pupteatra kreado, arto kiu distras kaj plinobligas la korojn de infanoj kaj plenkreskuloj. Estis kvarspecaj ĵurioj, kiuj aljuĝis premiojn por la plej bonaj prezentaĵoj. Unu el tiuj ĵurioj proklamis kiel plej bonan prezentaĵon de la ĉi-jara festivalo "La malbela anasido", kiun prezentis la pupteatro el Zadar (Jugoslavio), kaj post tiu sekvis la popola pupteatro el Burgas (Bulgarujo), kiu ricevis premion por "La ses pingvinidoj" de la bulgara aŭtoro Boris Aprilov.

La aranĝinto, Internacia Kultura Servo (Zagreb, Amruŝeva 5/1), eldonis 20-paĝan dulingvan (Esperanta-kroatan) katalogon, kiu estas ilustrita per dek scenoj el la prezentaĵoj de la pupteatroj.

La plano por nia laboro

Prepardiskutoj por la Tria Laborplano

Ofte novuloj turmentas spertulojn per siaj ideoj, kiel Esperanto povus rapide venki. Sed ni scias, ke ne iu plibonigo decidas pri la sorto de Esperanto. Necesas agi sisteme, laŭ plano, kiu enhavas la erojn, ilian ordon kaj interligitecon, ĉar ĉiu ero apogas aliajn kaj estas mem apogata. Laborplanon ni bezonas, el kiu ĉiu ero bezonas pritrakton, kiel prave profesoro Lapenna ĉiam akcentas. La interligiteco tipa por plano malaperas, se la rezonado koncentriĝas al izolaj punktoj. Tial la "diversaj ideoj lanĉitaj por diskuto" de sinjoro Schleicher (revuo *Esperanto*, 1972, paĝo 166) estas ja interesaj. Tamen estus preferinde, dekomen- ce meti siajn ideojn en koheran konstruon.

La ĉefa konsilo de sinjoro Schleicher estas, ke Esperanto metiĝu *en la servojn de vasta publiko*. Kie estas publiko, al kiu Esperanto estus servo? Ĉar "ni ne povas rekte proponi al homo uzi por la profesia laboro Esperanton", ofertiĝas la konsumada sfero, el kiu internacia estas la translima vojaĝado. Se servoj staru pli forte en la centro, do la flegado de la Esperanto-turismo devas esti pliintensigata. Ni bezonas plurajn kastelojn Grésillon kaj iniciatojn, kiel ilin faras la hungaraj kaj bulgaraj esperantistoj. Turismaj servoj estu prioritato* en nia laborplano. Ankaŭ tiu rangigo estas esenca por plano. Bunta bukado el multegaj ideoj vualas esencaĵojn; kontribuanto devas celkonscie ordigi la elstarajojn. Tiu pensmaniero laŭ prioritatoj mankas en la prezentaĵo de sinjoro Schleicher.

Se ni pintigas nian turisman oferton, ni turnas nin al homoj simple *uzantaj* la eblojn de internacia komprenilo. La diferencigo de la scipovantoj de Esperanto inter *agantoj* kaj *uzantoj*, kiun faras sinjoro Schleicher, estas interesa karakterizaĵo. Tro ofte ni imagas ankoraŭ la kutiman samideanon, en kiu kombiniĝas ambaŭ trajtoj. Aganto estas ankaŭ uzanto, sed laste amasiĝis uzantoj, kiuj ne volas labori por

* prioritato: rajto, starigita de reglamento, fari aŭ akiri ion antaŭ ol la aliaj homoj.

nia afero. Ni devas agnoski la ekziston de tiu homspeco, eĉ se tio havas konsekvencojn "ankaŭ en la organiza aparato", ekzemple ĉar uzantoj kutime ne membriĝas. Membrovarbado estas kaj restas unuarange grava, ĉar Esperanto vivas nur, kiam agantoj plenigas niajn vicojn. Sed apude la uzantoj devas esti samsimpatie registritaj kaj akceptitaj — kiel ankaŭ ilia financa kontribuo por la servoj de ili konsumataj.

Pli profunda zorgado pri uzantoj kompreneble relativigas la klopodojn pri novaj membroj en niaj organizaĵoj. Bone estus, se ankaŭ la uzantoj estus iel kapt-eblaj kiel membroj, se ne en klasika movado, tiam eble en novstilaj grupoj. Sed se la uzantoj neniel pretas ie ajn membriĝi, ni tamen ĝoju pri tiuj novforme ligitaj lingvanoj. Niaj klopodoj etendiĝu al ambaŭ kategorioj, agantoj kaj uzantoj. Doni ĝustajn proporciojn al la varbado de agantoj (membroj) kaj de uzantoj malfermas al ni la perspektivon de aktivularo donanta gravajn servojn al internacia publiko (kun tiam pli bona ŝanco ricevi la Nobel-premion por Paco ol nun).

Prefere sendepende de la ŝtato

Por trovi uzantojn necesas intensa informado; tio samtempe ebligas trovi agantojn kaj altigas la ĝeneralan scion kaj principan aprobon de Esperanto. La kombino de ŝtata mempropagando kaj esperantista agado ("landaj revuoj respegulantaj kiel ĉefan linion la vivon de la propra lando") estas problema. Pli bone landa asocio disponu pri publikigaj ebloj sendependaj de la devo nepre aplaŭdi tion, kion la ŝtato volas. Sed por efika informado ni devas turni nin eksteren kaj atentigi pri ni en normalaj gazetoj, televido ktp. Kun la aserto pri la taŭgeco de Esperanto ni ne hejmiĝos tie; ili volas raporti pri okazintaĵoj. Jen alnodiĝas al la informa laboro la tasko kunvenigi homojn per Esperanto. Kio estas plaĉa al uzantoj, donas al agantoj la eblon, atentigi la publikon. Kaj ofte aldoniĝas la plua eblo ricevi ŝtatan subvencion por internacia renkontiĝo. Kunvenoj signifas *aŭtomate* tutan faskon de taskoj kaj — se bone plenumitaj — de sukcesoj.

Taskoj mondaj kaj lokaj

Tiuj tre praktikaj taskoj devas esti loke plenumitaj, ili do estas laboroj por landaj asocioj aŭ lokaj societoj. La taskoj de la mondvasta UEA kaj la lokaj laboroj estas diversaj. UEA multe progresis, aktiva motoro kiel profesoro Lapenna antaŭenpuŝis ĝin. Estas facile konstati, ke "multaj landaj organizaĵoj grave postrestis". Ilia tasko ja ankaŭ estas tre malfacila, tie ĉe la fronto mem! Post la altvaloraj atingoj de UEA mondscale nun la tuta movado devas multe pli dediĉi sian atenton al la progresoj en la landoj. UEA estas la stabo ellaboranta nian strategion kaj ĉefe decidanta la taktikon ĉie. Sed pro la nepra graveco de la atakado ĉe la fronto ĉiu partoprenu ankaŭ en tiu rekta batalo. En tiu kunteksto gravas, ĉu la ĝisnuna organizaj ebloj: UEA — landaj asocioj — lokaj societoj, sufiĉas aŭ ĉu ne utilis aldoni aktivajn ĉelojn en du pliaj ebloj: plurnaciaj agadoj kaj regiona laboro. El kvin etaĝoj la fortikaĵo Esperanto povas pli multe pafi ol el nur tri.

La ideĉeno: sincerkora agnosko de uzantaro — servoj al ili ofertitaj de la agantoj ĉefe en turismo, per kunvenoj k.s. — financaj rimedoj de la uzantoj pro la servoj por la laboroj de la agantoj — ekspluatado de kunvenoj informcele — varbado de membroj kaj novaj uzantoj, estas unu parto, tamen jam grava, de ĉiuj necesaj taskoj. Apartenas al prioritataj kampoj certe la scienca laboro kaj la atentigado de la gvidaj naciaj instancoj pri Esperanto (registaroj kaj parlamentoj), unu el la ĉefaj klopodoj de sinjoro Schleicher, cetere io mankanta en la nun valida laborplano. Ne eblas ĉion ĉi tie priskribi. Sinjoro Schleicher malsukcesis en tio, mi same fiaskus. Sed tial ja tuta komisiono estis establita antaŭ 1½ jaroj por verki proponon de nova laborplano. Intertempe bedaŭrinde nur en Frostavallen la laborplano staris sur la tagordo. La komitato 1972 malmulte pritraktis ĝin, kaj ankaŭ koresponde ĝi ne estis evoluigita. Nun la tempo urĝegas! Anstataŭ dum la trankvilige longa tempo diskuti pri la laboroj, la plano nun devas esti modlita sub tempopremo por akcepto en Beogrado. Kiel harmoniigi nun rapide starpunktojn, se unuj opinias fridan analizon de faktoj sola bazo por pluevoluo — kio por aliaj estas mispaŝo? Se por unuj estas gravega, kio por aliaj rompiĝas je la muro de ignoro? Pri la jam perdita tempo ni ankoraŭ pentos?

Restas unu gravegaĵo. Sinjoro Schleicher estas "sendube ... konvinkita, ke tute certe ĝi (Esperanto) iam atingos sian celon". Sed ĉu vere ne estas imageble, ke Esperanto forgesiĝos, inkluzive de sia literaturo, kiu povas fariĝi same historiaĵo kiel germanaj libroj presitaj gotiklitere? Esperanto vivas nur, ĉar ĉiam de nove aktivuloj estas kaptitaj de la impona ideo pri facila interkompreniĝo en la mondo. Se la kontinua alfluo de novaj adeptoj (en la nova terminologio de "agantoj") malkreskus aŭ ĉesus, Esperanto irus la vojon de aliaj mondlingvaj grupoj. Malapero okazus paŝe: unue per ĝeneraligo de la fuŝado kaj perdo de la scienca bazo, poste per koncentriĝo al malmultaj centroj, tial malmulta vivo, malgranda altirkapablo, malkresko de la anaro, malrapidiĝo kaj malapero de eldona laboro, fine manpleno da aĝuloj interŝanĝantaj cirkulerojn.

La konscio pri la absoluta neceso de agresema aktiveco — kontraŭe al pasiva atendado ĝis la fina venko — devas formi ankaŭ nian novan laborplanon. Estas nia tasko montri al la mondo, ke io tiel aŭdaca kiel internacia lingvo estas vivkapabla kaj povas doni valoregajn helpojn al la homaro suferanta pro komunikadaj kaj tial komprenaj malfaciloj. La stumblaj aplikoj de fremdlingvaj scioj, la lingva diskriminacio, la multekosta kaj malgraŭ tio nekontentiga tradukado, ne estas neevitebla sorto de la homaro. Ni scias tion, kaj nia tasko estas pruvi tion senĉese.

Werner Bormann, F.R. Germanujo

Traduki nacilingven

Proponita ero: kompetentuloj traduku la plej bonajn verkojn de la Esperanta literaturo en naciajn lingvojn por plialtigi la prestiĝon de Esperanto en literaturaj rondoj. Mi mem tradukis "La infana raso" de Auld en la nederlandan lingvon, kvankam ankoraŭ ne trovis eldoniston.

W. A. Verloren van Themaat, Nederlando



Jen alloga jarfina oferto de UEA! Ni proponas al vi:

200 diferencajn poŝtmarkojn skandinaviajn	5 gld.
300 " " "	7 gld.
500 " " "	14 gld.
1000 " " "	45 gld.
100 " " usonajn	2 gld.
200 " " "	8 gld.
300 " " "	15 gld.
400 " " "	22 gld.
500 " " "	35 gld.
600 " " "	50 gld.

Simile ni de preskaŭ ĉiu ajn lando povas oferti de cent ĝis kvincent diferencajn poŝtmarkojn. Eblas mendi ankaŭ kvantojn laŭ temoj: ekzemple pri sporto, bestoj, astronaŭtiko, pentraĵoj ...

Se vi ne mem kolektas, eble vi volus fari plezuron al amiko aŭ infano per bela donaco, kiu samtempe helpas fortikigi la Esperanto-movadon finance. Mendojn, laŭeble kun samtempa pago, bonvolu direkti al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Esperanto en radio

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francujo. Por aliaj detaloj vidu la oktobran numeron.

SVISA RADIO prezentas siajn programojn je samaj tagoj kaj horoj, sed kelkaj ŝanĝoj okazis pri ondlongoj: 1) lunde kaj merkrede, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.44 m (15430 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94 m (21520 kcs), 13.90 m (21585 kcs), 2) ĵaŭde kaj sabate, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 31.28 m (9590 kcs), 25.60 m (11720 kcs), 25.27 m (11870 kcs), 19.60 m (15305 kcs). Libreto pri la diversaj programoj al eksterlando aperas dufoje en la jaro kaj estas sendata senpage al ĉiu petanto. Skribu al: Svisa Radio, SOC, CH-3000 Berne 16, Svislando.

RADIO SABADELL nun prezentas sian merkredan programon de 19.30 ĝis 19.45; sama ondlongo, 203 m (1475 kcs).

USONO. Kurso estas dissendata per la lokaj stacioj en Colombus (Ohio) kaj Portland (Oregon). Vidu la novembran rubrikon.

ĈEĤOSLOVAKUJO. Kurso estas dissendata de la stacio Bratislava. Vidu la novembran rubrikon.

ENKONDUKO AL MATEMATIKA LINGVISTIKO

Recenzas W. A. Verloren van Themaat
(Amsterdam):

Matematikaj metodoj en lingvistiko, de Heinz D. Maas. Lieĝo (Belgujo): Someraj Universitataj Kursoj, 1972. 52 p. 27 cm.

Li nomas la libron modeste kaj prave "Enkonduko". Multan originalan esplorkoncepton ĝi ne entenas, sed kiel enkonduko por laiko en novan fakon ĝi havas valoron.

Nepre eraro estas la aserto: "Ĝis hodiaŭ oni konas nur ensemblojn finiajn aŭ samampleksajn kiel N aŭ samampleksajn kiel R (= la realaj nombroj)" (p. 19). Ekzistas infinite multe da infinitaj kardinalaj nombroj. La lingvistika parto neglektas multajn gravajn lastatempajn evoluojn. "Tial ĝis hodiaŭ ne estas tute klare, kio matematike estas la transformacioj." (p. 49). Matematika analizo de transformacioj troviĝas en Peters/Ritchie*. Sur p. 52 ĝi priskribas kiel ĝeneralan modelon de transformacia gramatiko la t.n. *generan sintakson* kaj neglektas la *generan semantikon*, minimume same gravan en la lingvistika literaturo de la lastaj jaroj. Ĉu Maas mem ne konas tiujn evoluojn aŭ ĉu pro pedagogiaj motivoj li ne mencias ilin en unua enkonduko?

Ĉiukaze: libro tre rekomendinda por laikoj volantaj ekkoni la matematikan lingvistikon.

Mendu ĉe UEA: Prezo anoncota.

* Peters, S. — Ritchie, R.W.: 1969, "A Note on the Universal Base Hypothesis", *Journal of Linguistics* 5, 150-2.



KUN ONKLO HO

Recenzas Marinko Ĝivoje (Jugoslavio):


Kun onklo Ho, de diversaj aŭtoroj. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1972. 398 p. 19 cm.

La 400-paĝa verko konsistas el 21 skribaĵoj — travivaĵoj — de diversaj aŭtoroj, kiuj, grandparte kiel kunbatalantoj, havis la okazon labori kun Ho Chi Minh. En sia simpla vivo li "centfoje ŝanĝis sian nomon, faris dekduon da malsamaj metioj, vizitis multajn malliberejojn, foje altiris al si mortopunon". Dum sia 30-jara vojaĝo kaj agado tra la mondo (Francujo, Sovetunio, Ĉinujo ktp.) li preparis la enlandan revolucion movadon. Li estis spertinta punjugon, veterŝanĝigojn, la plej nigran mizeron (ankaŭ inundon en 1944-45, kiu kondukis al la malsatego, pro kiu en printempo 1945 mortis pli ol 2 milionoj da loĝantoj en la norda Vjetnamujo), sed ankaŭ akirinta multajn sukcesojn.

Mi notis lertajn vortkunmetojn: nigrevidulo, vicpecoj de maŝinoj, pliĝustadire k.a.

Mendu ĉe UEA: 4,20 (por Nederlando 4,37) gld., plus sendokostoj 10%.

LINGVE FLUA, BON- STILA



Recenzas Vilho Setälä (Finnlando):

Barbro kaj Eriko, de Alois Schneider kaj Magda Carlsson. Oosaka: Japana Esperanto-Librokooperativo, 1972. 40 p. Ilustrita. 20 cm. (Represo de la originalo de 1933.)

La libreto estas evidente intencita por uzo kiel unua legolibro de kursfinintoj. Laŭ la antaŭparolo, la simpla lingvo ebligas, ke la libreto povos servi ankaŭ en kursoj por komencantoj. Tion mi kontestas. Eĉ por lernanto, kiu sukcese finis bone planitan elementan kurson, en la unua letero aperas pli ol 30 novaj vortoj en 38 linioj, kaj proksimume simile daŭras. Lingve la libro estas flua kaj bonstila.

Kiam temas pri postkursaj legolibroj rekomendindaj, la instruisto devas pensi pri elekto de la plej taŭga por liaj lernantoj.

Mendu ĉe UEA: 2,28 (por Nederlando 2,37) gld., plus sendokostoj 10%.




ŜTELPROVO MALSUKCESIGITA DE LINGVO-BARO

— en la dulingva Kanado

Montreal, 7an de sept. (AP). — Bankrabisto alpaŝis la ĝiĉeton de urbcentra banko hieraŭ kaj prezentis noton kiu legiĝis france: "Ĉi tio estas rabo. Metu vian monon en la sakon".

La deĵoranto, kiu komprenas nur la anglan, reagis konfuzite. La rabonto senpacience ripetis la instrukcion laŭte — france. Ankoraŭ nenia kompreniĝo.

Finfine la deĵoranto en la apuda ĝiĉeto legis la noton, tradukis ĝin kaj metis 500 dolarojn en la sakon de la rabisto. La agacita rabisto prenis la monon kaj ekkuris, sed estis retenita de du bankdungitoj, kiuj ĝuste taksis la situacion dum la lingva konfuzo.



KONSCIENCA VERKO, UTILA POR OLIMPIKO

Recenzas Kees Ruig (Nederlando):

La sporta lingvo en Esperanto*, de Tibor Ujlaky-Nagy. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1972. 303 p. Ofsetita. 20 cm.

En formo de projekto la aŭtoro proponas fakterminojn por 30 sportobranĉoj olimpikaj (de akvo-pilkado ĝis velado). Pro la priskriba karaktero la libro pli similas sportenciklopedion ol terminaron. Stiligitaj simboloj klare ilustras unuopajn difinitajn sportojn kaj donas al la libro modernan ornamaspekton. La aŭtoro kuraĝis suriri la glatan glacieron de la vasta sportkampoj. Dise en la verko li forglitis, eĉ falis pro neologismaj, anglismaj, sportteĥnikaj obstakloj; sed kiu ja scias 30 sportojn? La forlaso de "ad" en sportoj, derivitaj de verboj (kuro anst. kurado) neĝustas. Kio estas la diferenco inter Badmintono kaj Plumpilkado, kaj kio estas Boŭlo (*jeu de boule?*), Draĵvo (*surfriding?*), Joringo? Kial "kiki" kaj "ŝoti" anst. piedbati (france ja *frapper du pied*), pafi aŭ lanĉi respektive? Ankaŭ "Vego" anst. irejo, irstrio, aŭ ev. trajekto, trako, areno, dromo estas superflua neologismo; same asalto (= atako), ekskludo (= ekskludo), servi (= prezenti, startfrapi), seto (= serio), ofsajde (= eksterlude, eksterlime). Vortoj kiel slupo, luva, lea, ankrosokoj estas evidente prenitaj el *Plena ilustrita vortaro* (PIV), kvankam Marista Esperanto-Rondo Internacia antaŭ pli-ol-12 jaroj oficiale aprobis la vortojn ŝalupo, lofa, mallofa, ankrabrakoj kiel menciitaj en Marista terminaro de P. Clissold. Validas do ĉi tie rimarko ne blinde uzi fakterminojn el PIV.

La vorto "leno", kiu signifas en la ŝipado ŝnuron de difinita diametro, estas neklara en la ĉapitro

pri remado. Kelkfoje la klarigo ĉe neologismoj mankas: kio estas super- kaj subajzi en arkpafado?

Ekzemploj de teĥnikaj mankoj:

Ĵudo: ĵudomato estas pli preciza ol ĵudotapiŝo; same grund- aŭ plankbatalo anst. terbatalo. La ĵudojako ne atingas la genuojn, la zono ne estas nodligita surdorse, sed surventre. Senmoveco por gajni *ippon* el fiksteno ne necesas, sufiĉas senlibero. Mankas la gravaj terminoj *tori/uke* (atakanto/-ito).

La tradukoj el la japana ne respondas al tiuj de la ĵudo-eksperto Kyuzo Mifune: ekz. *oo sotogari*: kontraŭgamba alpendigo (p. 125), granda eksterenforĵeto (Mif.). Ĉar "oo" signifas grandon en la japana, mi timas, ke Mifune pravas kaj ke la Sporta Lingvo eraras. Kiu japano arbitracios?

Velado: maristo preferus droni ol diri dekstre/maldekstre; li diras triborde/baborde. "Maldekstra-blovume" estu "babordalvente". La mencio, ke velŝipoj ekde 25 m² devas uzi verdan kaj ruĝan lampojn, estas malĝusta. La Internacia Regularo preskribas tion por velŝipoj ekde 20 toneloj.

Ascendi, descendi, ĝiri estas superflujaj novaj esprimoj por lofi, mallofi, kaj taki; ĝiri estas erare uzita, ĉar ĝi signifas zigzagi. La esenca esprimo "boardi" mankas en la libro.

Faktermina projekto kompreneble ĉiam elvokas pli da kritiko ol alieca libro. La finkonkludo estu: Konsciencia verko, utila helpilo por la Olimpiko. Antaŭ la definitiva eldono necesas pli intensiva kunlaboro kun spertuloj pri sporto.

* La libro estas eldonita nur en 500 ekzempleroj, ne por vendo sed por akiro de kritikoj kaj plibonigaj opinioj de kompetentuloj. Nur post la konsidero pri ili, la definitiva eldono okazos. La adreso de s-ro Ujlaky-Nagy: Vásárhelyi Pál u. 12, Budapest XI, Hungarujo. (Red.)

Laste aperis

Al Turku! Eld. Turun kaupungin kiinteistöasasto, Linnankatu 39, Turku, Finnlando. Kolorpresita turisma prospekto kun mapo. Ho Chi Minh: **Kun Onklo Ho** Diversaj aŭtoroj. Tr. el la vjetnama. 398p. 19cm. 4,20 gld. Kolekto de memoraĵoj, impresoj kaj priskriboj de kiuj, kiuj laboris kun Ho Chi Minh. Eld. 1972.

Infanoj en Torento (1934) Stellan Engholm (1899-1960). 100p. 20cm. 6,42 gld. Fotorepreso 1972. Originale verkita romano pri kvar geknaboj: ilia kreskado, ludoj, lerneja kaj hejma vivoj.

More sfas esperanta (1909) D. Gurevič (Hurvic). 79p. 21cm. 3,72 gld. Malnova hebrelingva lernolibro kun trilingva vortaro hebrea-jida-Esperanta. Fotorepreso 1970. Ne taŭga por instruado, sed interesa por bibliofiloj k.a.

Printempo en la aŭtuno, rakonto pri dolĉe melankolia renkonto (1931) Julio Baghy (1891-1967). 116p. 19cm. 6,42 gld. Romaneto originale verkita en Esperanto, desegnanta per paŝtelaj koloroj la burĝonan amon de knabo kaj knabino. Fotorepreso 1972.

Sonĝo kaj maldormo sub la karpeneto Ivo Andrić (1892-). El la serba tr. Roger Imbert kaj Zlatko Tišljar. 79p. 17cm. 9,72 gld. Novelkolekto de nobelpremiita aŭtoro pri la vivo de bosnia vilaĝano en la tempo de la aŭstrohungara okupado.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 14% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.

LOKE FAKE PERSONE

LOKE

Hindujo

- La registaro de la provinco Asamujo uzis la armeon por fari kordonon kaj malpermesi eliron de la civitanoj en du urboj pro la disvastiĝo de lingva batalo, en la 8a de oktobro 1972. Pro bruligo, rabado k.a., vundiĝis dekoj da homoj, kaj oni arestis pli ol cent. La kaŭzo de la batalo estis, ke la provinca registaro rekomendis fondon de nova universitato en la bengallingva regiono, al kio kontraŭstaris asamlingvaj studentoj.

Israelo

- Nun plivigliĝas la landa movado entute, i.a. pro novaj enmigrintoj el Soveta Unio kaj pro oftaj vizitoj de eksterlandaj esperantistoj. Krom multfoja publikigo de artikoloj kaj sciigoj pri Esperanto en la gazetaro, lastatempe okazis elsendo de duonhora radio-programo kun prelego de d-ro H. Maŝler pri la Internacia Lingvo.

Libio

- La registaro de Libio decidis ne plu akcepti iun ajn pasporton, en kiu la araba ne aperas kiel unu el la lingvoj de la teksto. La decido validas ekde la 1a de januaro 1973. Kiel konate, Libio jam entreprenis paŝojn por minimumigi la uzon de fremdaj lingvoj sur sia teritorio kaj forte laboras por antaŭenigo de la araba.

Kune ludis, kantis kaj babilis gepatroj kaj infanoj, kies hejma lingvo estas Esperanto, en la kadro de internacia Vinrikolta Semajnfino en Szentendre, Hungarujo, komence de oktobro.



Urugvajo

- La Senato de Urugvajo decidis rememorigi la centjarian datrevenon (1972-10-16) de la naskiĝo de fama nacia filozofo, d-ro Carlos Vaz Ferreira, en solena sesio de la Senato. Unu el liaj ĉefaj verkoj estis eldonita de Urugvaja Esperanto-Societo en 1960 en la Internacia Lingvo, kion menciis d-ro Angel Rath, senatano, en prelego en la Senato.

Vjetnamujo

- Oficiala delegacio de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, invitate de Bulgara Esperantista Asocio, ĉeestis ĝian 38an Kongreson en la pasinta julio. La delegacio krome vizitis dum 2 semajnoj plurajn urbojn tra Bulgarujo. La delegacion invitis ankaŭ Komisiono por Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj por unu-semajna restado, dum kiu la delegacio havis kontaktojn kun sovetuniaj esperantistoj. Ankaŭ en Ĉeĥoslovakujo, la landa sekcio de Mondpaca Esperantista Movado, kolektante monon, klopodas ebligi al vjetnamaj esperantistoj partopreni la 58an Universalan Kongreson en Beograd kaj la venontjaran MEM-kunvenon.

FAKE

Fervojistoj

- En luksemburga urbeto Clervaux kunvenis, de la 6a ĝis la 9a de oktobro, 288 esperantistoj-fervojistoj el 12 landoj, invititaj de la belga, franca kaj germana fervojistaj Esperanto-asocioj por ĝui varian kongreseton. Salutis ĝin kun sia ĉeesto i.a. la urbestro de Clervaux kaj la prezidanto de la internacia asocio de artaj kaj kulturaj fervojistoj (*FISA/C*, sub kies aŭspicio la kongreso okazis).

Filmo

- La Aŭstralia Registara Oficejo por Novaĵoj kaj Informoj eldonis esperantlingvan novan kolorfilmon (16 mm., 20 minutoj) pri Aŭstralio. La filmo nepolitike prezentas la ekonomian evoluon kaj eblecojn de la lando en moderna stilo. La landaj Esperanto-organizaĵoj povas ricevi ĝin sub kelkaj kondiĉoj, pri kiuj ili povas informiĝi ĉe Aŭstralia Ambasado en F. R. Germanujo (adreso: Kölner Strasse 107, D-53 Bonn Bad Godesberg 1).

Interlingvistiko

- "Interlingvistika Informa Servo", eldonata de la Societo por Internacia Lingvo (ĉefo: d-ro Artur Bormann, Schaumanns Kamp 126, D-2057 Reinbek, F.R. Germanujo), regule aperadas jam dum 15 jaroj. La ekzisto de la Societo, ĉi-jare 20-jara, konsiderinde kontribuis al konsciigo de esperantistoj pri la neceso de scienca traktado de la Internacia Lingvo.

PERSONE

Thomson

- George Thomson, nova brita reprezentanto ĉe la Eŭropa Komisiono de Eŭropa Komunumaro kaj eksministro de Laborista Partio, iam lernis Esperanton kaj en 1958 faris paroladon antaŭ britaj esperantistoj laŭ informo aperinta en *Daily Express* (1972-10-11), la due plej vaste legata ĵurnalo en Britujo.

Deponi manuskriptojn

Skribas A. W. Rowe (Britujo):

Kun granda intereso mi legis pri la instalo de kserografia aŭtomato en la biblioteko Hodler, kaj proponas, ke UEA nun invitu la verkintojn de seriozaj neeldonitaj manuskriptoj deponi maŝinskribitan kopion ĉe la biblioteko por laŭbezona kopiado. La kreskanta listo de tiuj verkoj povus aperi ĉiujare en la *Jarlibro* (ĝis la amplekso necesigos apartan liston) kun indikoj pri la titolo, aŭtoro, kategorio de verko kaj nombro de folioj. Per tiu rimedo, ĉiu esperantisto kapabla verki aŭ traduki ion eldonindan havus plenan instigon liveri sian materialon, bezonante nek eldoniston nek kapitalon. Pri la probabla nombro de legontoj/aĉetontoj ne leviĝus demando.

Ĉi tiu projekto certigus, ke se vendiĝus eĉ ne unu sola kopio de iu verko, oni perdus nenion, kaj tamen la verko estus daŭre havebla. Mi pensas precipe pri fakaj verkoj, kiuj interesus nur limigitan nombron da esperantistoj-fakuloj, kiuj alie neniam povus esperi pri apero de tiufakaj verkoj en Esperanto. Aliflanke, ĉe verkoj de pli ĝenerala intereso la populareco de tiu aŭ tiu manuskripto, mezurita laŭ la nombro de kopimendoj en donita periodo, povus esti grava indiko favore al eventuala eldonado en presita formo.

Respondas la redakcio:

Ni bonvenigas la proponon. Efektive, la Biblioteko Hodler jam enhavas plurajn gravajn verkojn en manuskripta formo. Ni preparas liston por eventuala publikigo en la *Jarlibro*. Intertempe, interesitoj, kiuj eble volus mendi kopion de iu manuskripto, povas peti la liston ĉe UEA. Pliajn gravajn manuskriptojn la Biblioteko volonte akceptos. La aŭtoroj aŭ tradukintoj bonvolu tamen unue proponi sian manuskripton al la Biblioteko, antaŭ ol efektive sendi ĝin, kaj atendi la konsenton. Adreso: Biblioteko Hodler, UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Ne nepo, sed nevo

Skribas mag. Isaj Dratwer (Israelo):

Kun granda intereso mi legis vian raporton pri la Universala Kongreso en Portland kaj kun miro konstatis, ke "prof. Zamenhof" estas "nepo de la iniciatinto de Esperanto". La sola nepo de la kreinto de Esperanto estas la filo Ludoviko de ged-roj Adam kaj Wanda Zamenhof.

Respondas la redakcio:

Mag. Dratwer tute pravas, kaj ni pardonpetas pro la eraro ankaŭ al prof. Stefan Zamenhof, kiu ja ne estas nepo sed nevo de d-ro L.L. Zamenhof, nome filo de lia frato Henryk.

Nesufiĉa vendado?

Skribas Dermot J. F. Quirke (Britujo):

La debato pri la kaŭzoj de nesufiĉa librovendado (*Esperanto*, januaro p. 2-3, kaj junio p. 109) estas kurioza specimeno de nia tendenco al masohisma sinriproĉado; ĉar la fenomeno diskutata estas efektive iluzia. Eĉ se ni kalkulas la nombron da aktivaj esperantistoj je unu miliono (kion mi opinias troigo), tio signifas, ke disvendado de nur 500 ekzempleroj de iu verko estas jam relative furora sukceso; kaj tamen ne malofte eĉ altnivelaj beletraĵoj atingas duoblon de tiu cifero, kaj foje eĉ pli. Ni tion komparu, ekzemple kun la anglalingva libromerkato: brita eldoninto disponas pri 60 milionoj da eblaj aĉetontoj en la brita insularo mem (plus 250 milionoj en aliaj anglalingvaj landoj), kaj cetere pri vasta reto da vendejoj kaj aĉetemaj bibliotekoj — sed en tiaj tre favoraj cirkonstancoj, eldonkvantoj malofte superas 2 500, dum iom esotera poemaro ofte aperas en nur milo da ekzempleroj, aŭ eĉ malpli.

Ni rajtas do fieri pri la preteco de la Esperanta publiko amase aĉetadi literaturaĵojn, kredeble ni estas la plej libro-aĉetema komunumo en la mondo, nome proporcie al nia nombro. Oni do maljuste riproĉas nin pro nesufiĉa aĉetado — kvankam kredeble oni rajtus kritiki, ke — aĉetinte niajn librojn — ni ne tre emas ilin *legi*! Sed tio estas tute alia demando...

Pri limregionoj

Skribas O. Hoekstra (Nederlando):

La eŭropa instruista organizaĵo por Belgujo (EVOP) aranĝis en Turnhout (Belgujo) internacian konferencon en oktobro 1972.

La prezidanto de la nederlanda sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj vizitis la konferencon kaj havis la eblecon vaste informi pri Esperanto kaj organizi provlecionon, kiu estis sukcesa.

La konferenco pritraktis problemojn de regionoj, kiuj situas laŭlonge de la nederlanda-belga limo. En Belgujo, same kiel en la apudaj landoj Nederlando, FR Germanujo kaj Francujo, la limregionoj estas ne sufiĉe evoluintaj, ĉar la distancoj al la industriaj regionoj kaj grandaj urboj estas tro grandaj. Tial necesas tute malfermi la limojn kaj en tiaj regionoj kune kun la najbaraj landoj konstrui ŝoseojn kaj industriajn kaj kulturajn centrojn por la diversnacia popolo. Nun ekzistas plano krei komunajn mezajn kaj altajn lernejojn por tiuj limregionoj. Estas kompreneble, ke al tio donos problemojn la lingva diverseco.

Tial estas por ni esperantistoj grava afero aŭdigi niajn voĉojn ankaŭ en tiaj konferencoj, ĉeestante ilin.



TEJO

TEJO-redaktoro
G. D. Winkler,
Jaegerstr. 27,
D-42-Oberhausen-
Sterkrade,
F. R. Germanujo

En Karl-Marx-Stadt kaj Rethimno

(Raportas: Maria Rosa Pinori, Italujo). Tuj post la Toruna Kongreso jen alia tre interesa kunveno: "Tendaro en Karl-Marx-Stadt", okazinta de la 24a de julio ĝis la 1a de aŭgusto.

La sufokanta varmo de Toruń sopirigis al ni freŝan aeron de arbaroj sur la montetoj de Karl-Marx-Stadt; la komfortaj ĉambroj kaj litoj de studenta domo revigis al ni junecajn konatajn adapteblecojn al dormsakoj, tendoj, pneŭmatikaj litoj, ktp; kaj kiam fine, post longa malfacila vojaĝo tra Pollando ni atingis la tiom atendatan tendaron, kun granda surprizo ni konstatis, ke la juneco estas nur revo kaj ke la sopirita 'freŝa aero' estas ne nur freŝa sed glacia!

Tamen ni admiris belan panoramon (verdajn herb-aĵojn kun romantikaj arbaroj: romantikaj precipe por la virinoj, kiuj petis ekskurson internen por konatiĝi kun la orient-germana ... naturo). Ĉarma etoso, spritaj, ĝentilaj kaj amuzaj kamaradoj, kantoj kaj vesperfajroj (ne nur pro romantikaj kialoj, sed precipe por varmigi la ĉirkaŭaĵojn de la tendaro), malmultaj debatoj: jen resume nia restado en Karl-Marx-Stadt.

Kaj kio pri la partoprenantoj? Ili estis multnombraj: poloj, hungaroj, ĉeĥoslovakoj, bulgaroj, rusoj (pli kantemaj ol la fifamkonataj kantemaj italoj), japano (la kutima Toŝiaki) kaj ni, la italoj!

Honorigis la nelaborgrupojn nia prezidanto Renato Corsetti kun sia ĉarma edzino.

La organizado perfekte — ĉu ni kuraĝus diri germanece — funkciis: ĉio je taŭga horo kaj laŭ la antaŭvidita programo: eĉ lastajn novaĵojn pri militoj kaj pacdebatoj ni aŭdadis per resuma ĵurnalradio dum vespermanĝoj (kies menuo, kompreneble, jam estis fiksita por la tuta semajno kaj presita kaj disdonita kune kun la kongresa dokumentaro).

Mencienda estas la libera debato okazinta en ĉeesto de Centraj Germanaj Komitatuloj pri ĵurnalaj aferoj, kiuj respondis sincere kaj objekte al ĉiuj demandoj

eĉ iom tiklaj. Gratulojn al la organizintoj.

Ni certigas ilin, ke neniam forestos el nia menso Karl-Marx, de kiu ni admiris la urbon, la aleon, la grandan bronzan ĉapon, la muzeon, ... ĉu li iĝos por la esperantistoj dua Nikolao Koperniko?



SEMED '72 okazis de la 30a de julio ĝis la 5a de aŭgusto en la urbo Rethimno (insulo Kreto, Grekujo). Partoprenis 27 personoj el Jugoslavio, Italujo, Francujo, Britujo kaj kompreneble Grekujo.

La temo estis "Argumentoj por kaj kontraŭ Esperanto en unuopaj mediteraneaj landoj kaj ebla kunlaborado".

Tre klare difinis la situacion s-ro Janez Zadavec el Maribor (Jugoslavio), per rimarkoj validaj ankaŭ ekster lia lando. Interesa estis ankaŭ la parolado de f-ino Claude Nourmont, pri tio, kiel al Esperanto povus utili la nunaj kontraŭcentrismaj tendencoj en Francujo. F-ino Nourmont parolis ankaŭ iom pri Norda Afriko.

La distra parto ne forrestis el la programo. La SEMED-anoj ekskursis al la najbara urbo Iraklio kaj al la famaj antikvaĵoj de Knoso. Ili estis ankaŭ invititaj de la urbestro ĉeesti la gajan lokan feston de la vino. Oni povis, kompreneble, ankaŭ naĝi kaj sunumi apud la maro.

Eble la plej grava rezulto estis la impreso de la loka loĝantaro. Okazis publika inform-vespero pri Esperanto en la urbodomo mem, kaj la loka gazeto raportis ĉiun tagon pri SEMED. Multaj personoj ŝajnis ekinteresiĝi pri la lingvo.

Fine oni ne forgesu la amuzan kaj instruan rektmetodan kurseton por komencantoj de s-ro Brian Moon, kiu venis el Britujo nur por okazigi tiun apartan gravan eron de la semajno.

Kiu volus kontakti kun Junulara Esperanto-Ligo Israela? Adreso: JELI, p.k. 4070, 31040 Haifa, Israelo.



EL LA 10 DEVOJ DE LA ESPERANTISTO

6. Verkante en Esperanto, ne kreu interesa, kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron; ne malesperu, se mankas aĉetantoj.

Kion diri pri la sesa devo? La aŭtoroj aŭ tradukintoj de libroj en Esperanto ne malesperu, se mankas aĉetantoj. Sed, aparte de la financa flanko, estas tre malkuraĝige por niaj bonaj aŭtoroj kaj tradukistoj, se iliaj verkoj — ofte fruktoj de longa, peza kaj sindona laboro — ne vendiĝas sufiĉe grandnombre. Se mankas aĉetantoj, eldonistoj ne pretas publikigi librojn. Tial, alia devo de ĉiu esperantisto estas, ke li regule aĉetu libron en Esperanto. Jam tiom ampleksa estas la literaturo en Esperanto, ke ĉies gusto estas kontentigebla. *Pasintjare* la libroservo de UEA eldonis en la Dua Parto de la Jarlibro tre detalan ilustritan katalogon de sia kompleta librostoko. Ĉion sciindan vi trovos en ĝi; pri lernolibroj, vortaroj, romanoj, poezio, teatraĵoj, sciencaj libroj pri bibliografio, filozofio, tekniko, politiko, historio, geografio, libroj por infanoj kaj komencantoj, kantoj, himnoj, muziko kaj fine 4 paĝoj kun titoloj de haveblaj gramofondiskoj.

7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperanton parolu.

En multegaj urboj kaj vilaĝoj ekzistas Esperanto-societoj. Ni nomas ilin "lokaj kluboj" aŭ "lokaj grupoj". En la tempo, kiam la homoj ankoraŭ ne ĝuis la 'benojn' de nia moderna epoko, vigle prosperis la klubvivo. La radio-ricevilo, la televidilo nuntempe katenas ĉiujespero centojn da milionoj da homoj al iliaj seĝoj en la familia ĉambro. Sekve la klubvivo fariĝis multe malpli vigla. Ankaŭ la Esperanto-societoj spertis tion kaj suferas pro ĝi. Tamen, la klubo prezentas al multegaj esperantistoj la *ununuran* okazon buŝe ekzerci la lingvon, *interkonsiliĝi* kun samklubanoj pri lingvaj demandoj, pligrandigi la vorttrezoron kaj lertiĝi en la praktika uzo de la lingvo. Vizitu do la kunvenojn de via loka klubo, helpu, se eble, en la preparo de la klubprogramo, zorgu, ke la klubvesperoj estu interesaj kaj lernigaj. Kaj plej grave: parolu Esperanton!

Estus bedaŭrinde, se tiun unikan ŝancon por praktiki la lingvon oni misuzus per nacilingva babilado. Sian propran lingvon oni povas ja utiligi la tutan tagon kaj eĉ la tutan nokton, se oni tion deziras. Ĝin oni ne bezonas praktiki dum la klubkunvenoj. En la jaro 1966, UEA eldonis 22-paĝan broŝuron sub la titolo: La Esperanto-Societo. Varme mi rekomendas ĝin al ĉiuj, kiuj iel interesiĝas pri la taskoj de la loka klubo. Ankaŭ tiuj, kiuj okupiĝas pri la plej taŭga aranĝado de klubkunvenoj, nepre legu ĝin. La broŝuro enhavas kvin ĉapitrojn, verkitajn de estraranoj (nunaj kaj iamaj) de UEA. Ili estas:

1. La rolo de la lokaj Esperanto-societoj por realigo de la Dua Baza Laborplano de UEA (de prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto de UEA).

2. Unikaj eblecoj por informado sur loka nivelo (de Günther Becker, ĝenerala sekretario de UEA)

3. Kie formiĝas la vera esperantisto? (de via redaktoro)

4. Kiel *vivadigi* niajn lokajn grupojn? (de Maurice Jaumotte, iama estrarano de UEA, mortinta en 1970)

5. Ekzemplo de modela Esperanto-societo (de prof. I. Lapenna)

La prezo de la broŝuro ne povas *fortimigi* iun ajn ... nur 0,50 gld.

Klarigoj:

pasint-jar-e: adverba formo, signifanta: en la pasinta jaro.
Komparu ankaŭ: frumatene, venontsemajne, morgaŭvespere, ĉiudusemajne, k.t.p.

unu-nur-a: pli forta, pli emfaza, ol "nura" (sola, unika).
(komparu: Li havas nur unu filon = Lia ununura filo (lia sola filo)).

inter-konsil-iĝ-i: interparoli kun aliaj personoj por peti konsilojn. (La klubanoj donas al si reciproke konsilojn = ili interkonsiliĝas. Sen interkonsiliĝo oni ne faru komunajn decidojn).

viv-ad-ig-i: Vivadi = longe, daŭre vivi. Se oni deziras, ke la klubo vivu longe, oni devas ion entrepreni por igi ĝin vivadi, por vivadigi ĝin.

for-tim-ig-i: kaŭzi timon tiel, ke la timigito forkuras. Forpeli iun, timigante lin.

La sovaĝaj leonoj timas sian dresiston; plurfoje ili eĉ timigas lin (= la leonoj kondukas tiel sovaĝe, agreseme, ke ili igas la dresiston timi ilin), sed neniam ili fortimigas lin (neniam la leonoj sukcesis tiom timigi la dresiston, ke li forkuris).

ĈIUSEKUNDE PLI GRAVA

Okazis en la oficejo de la urbodoma registrado, kie oni administradas la civilajn personaĵojn de la loĝantaro....

Ĉe la ĝiceto staras virino de iom matura aĝo, kiu ĵus ekloĝis en la urba komunumo. Ŝi devas plenigi diversajn formularojn. Veninte ĉe la linio, kie oni demandas pri ŝia aĝo, ŝi longe hezitas. Fine la oficisto, je la alia flanko de la ĝiceto, kliniĝas al ŝi kaj flustras kompreneme:

"Sinjorino, ju pli longe vi atendas, des pli embarasa fariĝas via situacio".



NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Herrmann. f-ino Marille, Heidelberg, F.R.Germanujo.
Pirlot, Germain, Oostende, Belgujo.
Sinclair, s-ino D.M., Caloundra, Aŭstralio.

NOVA MEMBRO-SUBTENANTO 1972

277 Álvaro Rabêlo, Brazilo.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1973-02-15 neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Belgujo: Jean-Marie Geron, FD Bruxelles; Ödön Lödör, D Gentbrugge; Germain Pirlot, D Oostende; Jeanne Nemes, D Stembert. **Brazilo:** Joaquim do Couto, D Niterói. **Bulgarujo:** Ĥristo Manolov, FD Polski Trambeŝ. **Ĉeĥoslovakujo:** Oldřich Kníchal, FD Praha; Ladislav Kynčl, FD Praha. **Francujo:** Marcel Duplan, D Le Mesnil Saint Denis. **F.R. Germanujo:** Berthold Fischer, FD List (Sylt) kaj D Westerland. **Hungarujo:** Karoly Fajsz, Eva Tóth, Emilia Radvánszky, Anna Székely, Árpád Máthé, ĉiuj FD Budapest. **Islando:** Walter Murawski, FD Laugarvatn. **Israelo:** Israel Israeli, VD kaj FD Tel-Aviv, Anat Zduński, JD Tel-Aviv. **Nederlando:** A.M. Peeraer, FD Alkmaar. **Nov-Zelando:** F.E. Wood, D Auckland; E.R. Parsons, D kaj FD Te Awamutu; D.B. Pease, FD Whangarei. **Soveta Unio,** Nadia Andrianova, FD Kiev. **Svedujo:** Lennart Svensson, FD Ljungby. **Usono:** B.M. Stigers, D Pittsburgh.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1972 — pro adresŝanĝoj kaj aliaj kaŭzoj)

Brazilo: Niterói (VD). **Ĉeĥoslovakujo:** Ostrava (JD). **Francujo:** Serley. **F.R. Germanujo:** Offenbach/Main, Westerland (D). **Hongkongo:** (VD kaj FD medicino, sporto, turismo). **Hungarujo:** Budapest (FD Esperanto-instruado). **Italujo:** Alessandria, Cassino, Roccasecca. **Nov-Zelando:** Auckland (D), Gisborne (D), Lower Hutt (FD geologio kaj religio: katolika), Rotorua (VD), Whangarei (D kaj FD turismo). **Svedujo:** Älvkarleby. **Venezuelo:** Valencia.

DONACOJ 1972 (Gld.)

Fondaĵo Canuto: Institucio Hodler '68, 1 500,—. Anonimulo, 356,09. Sumo ĝisnuna: 2 454,28.

Ĝenerala kaso: Aŭstralio: A. J. Baldwin, 5,93. Nederlando: f-ino A.J.M. de Jager, 50,—. Svislando: Hj. Unger, 181,38. Sumo ĝisnuna: 1 247,98.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (t.e. 1 internacia respondkupon). Pri la enhavo de la anonc(et)oj respondecas sole nur la anoncantoj.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton kaj afranki ĝin filatele, kio multe helpas al UEA finance. Dankon!

Librojn kaj broŝurojn elĉerpitajn proponas al vi je favoraj prezoj, el sia kolekto de duoblaĵoj, la Biblioteko Hodler de UEA. Petu liston kaj kondiĉojn ĉe: Biblioteko Hodler, UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Urĝe serĉata: Juna aŭ mezaĝa esperantistino por dommastrumado, minimume unu jaro. Bela ĉambro, vegetara manĝo kaj poŝmono garantiataj! Bona okazo por praktiki Esperanton kaj lerni germanan lingvon. Ofertojn kun foto al Familio D-ro Megalli, D-8191 Münsing/Obb., Germanujo.

La Eta Princo de Saint-Exupéry estas ĉarma 102-paĝa ilustrita libro "por infanoj", verdire kun *altnivela filozofio!* Mendu ĝin ĉe la tradukinto: Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source. Prezo: 28 fr. fr., afrankite.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, Strib, DK 5500 Middelfart, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj kriplulojn de la tuta mondo. Skribu por nia bulteno.

La dolĉa Franclando estu en ĉiu esperantista biblioteko! Romantika, riĉa kaj ĉarma 128-paĝa luksa libro kun 69 ilustraĵoj. Broŝurita: 28 fr. fr. afr. aŭ: 38 fr. fr., bindita. Mendu ĉe la aŭtoro: Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source.

Alfred Mayer, Zeppelinstr. 35, D-75 Karlsruhe 21, FR Germanujo, dez. interŝ. pm-jn k.ĉ.l.

Mi serĉas Esperantistojn, kiuj volas interŝanĝi kun mi poŝtmarkojn el la tuta mondo. Mia adreso estas: M.J.E. Kat, Boliviadreef 88, Utrecht, Nederlando.

Mi deziras interŝanĝi bildkartojn kaj korespondi pri turismo. Skribu al Maria Avramova, Str. Ivan Vazov 7, Gabrovo, Bulgarujo.

Bonvolu sendi leteron aŭ bildkarton al North Staffs Esperanto-Klubo, Cartwright House, Broad Street, Hanley, Stoke-on-Trent, Anglio, antaŭ la 30a de januaro. Responde vi ricevos bildon de la terakota busto de Zamenhof.

Juna, bonstata familio en Svedujo serĉas por adopto knabon aŭ knabinon (ĝis-2-jaran) el okcidenta Eŭropo. Por serioza pritrakto laŭleĝa bonvolu kontakti la peranton s-ro Ragnar Lindahl, Hopslagarevägen 54, S-691 00 Karlskoga, Svedujo.

Dezirkartoj el la dolĉa Franclando. Por ĉarme esprimi viajn bondezirojn, uzu la *tre originalajn* kartojn eldonitajn de la centro "Espéranto-Office", F-Orléans, profite por la senpaga instruado de Esperanto. Vidu la reklamon pri tio en nia numero de novembro 1972, paĝo antaŭlasta. Mendu tuj hodiaŭ!

INDEKSO

65a jaro 1972

- Afriko 8, 96, 196
Agado E3 8
Amikoj de Esperanto 182
Andersen 108
Apollo 201
Arto 194
Astrologio 33
Aŭstralio 83, 134, 214
Aŭstrujo 72, 115
Aŭtomobilismo 33, 135
- Bangladeŝo 32
Belgujo 32, 53, 115, 215
Bibliotekoj 9, 58, 73, 215
Bibliografio 171
Bjalistoko 206
Blinduloj 9
Brazilo 13, 32, 69, 194
Britujo 32, 50, 112, 134, 176
Bulgarujo 32
- Cavanagh 171
CED 5, 24, 58, 206
Chiussi 51
- Ĉeĥoslovakujo 170
Ĉilio 115, 136
Ĉina Popola Respubliko 4, 32
- Danlando 96, 134, 170
Deklaracio de Tyresö 108
Dimitrov 127
Diplomatio 33, 94
Diskoj: Vidu ĉe Eldonaĵoj
- Edukado (vidu ankaŭ ĉe Lernejoj) 194
Ekspozicioj 73, 108
Eldonaĵoj ĝenerale 2, 44, 72, 109, 133, 149, 181
Eldonaĵoj unuopaj:
 ABC's of Esperanto, The 45
 About Esperanto 191
 Apenaŭ bukedeto 27
- Aŭtuna foliaro 46
Barbro kaj Eriko 212
Cigana romancaro 110
Complete seven-day Esperanto course 90
Doktoro kaj lingvo Esperanto 174
Dolĉa Franclando, La 90
Enciklopedio de Esperanto 206
Esperanta legolibro 191
Esperanto lingvo de la sporto 192
Eta vivo 92
Falsaj amikoj en Esperanto 27
Ĝenerala instruado en V.D.R., La 91
¿Habla Usted en Esperanto? 191
Hilelismo 174
Infanoj de la malriĉuloj 192
Invit' al japanesko 66
Kremo de Kalocsay, La 26
Kun Onklo Ho 212
Kuŝanta tigro 190
Kvar pupteatraĵoj 90
Kvin filozofiaj verkoj de Maŭ 174
Laŭtema vortaro 46
Leksikono de oficialaj vortoj 66
Liriko 190
Matematikaj metodoj en lingvistiko 212
Mi estas Pelé 131
Modernaj tendencoj kaj evoluoj en medicinaj sistemoj 130
Montara krono 132
Nederlands-Esperanto-Nederlands 66
Neĝa lando 111
Nokturno '71 132
Plej sekreta libro pri Esperanto 28
Poŝatlaso de la mondo 45
Problemoj de etnaj minoritatoj 193
Rakontoj el pluraj landoj 191
Rangaku kotoĥajime 130
Reto, La 26
Retoriko 92
- Scienca revuo 205
Seminario "Lingvo kaj kulturo" 131
Senĝenaj dialogoj 9
Serĉado de la vivo, La 65
Sileziaj kantoj 91
Sporwegvakwoordenboek 111
Sporta lingvo en Esperanto, La 213
Suno kaj pluvo 110
Ŝercoj, rakontoj 132
Trans la fabeloceano 110
Tri pupteatraĵoj 90
Vjetnama kaj ĝia utiligo, La 91
Vocabulaire Espéranto 27
Vojaĝo al Nov-Zelando, La 193
Vojaĝoj al la sudaj insuloj, La 92
Wilhelm Heinrich Trompeter 46
- Eldonaĵoj krome aperintaj kaj ricevataj 9, 26, 44, 95, 111, 131, 155, 213
Esperanto-instruado 75, 121, 147, 148
Esperanto-societoj 49
Estraro: vidu ĉe UEA
Eŭropa Ekonomia Komunumo 21, 82, 83, 124, 208, 214
Eŭropa sekureco 172
Eŭropo 170, 194, 209
- Fervojoj 135, 214
Filatelo 211
Filmoj 171, 214
Financo: vidu ĉe UEA
Finnlando 13, 50, 112, 134
Fotokopia Servo 193, 215
Francujo 94, 134
Frostavallen 55, 163
- Gastlaboristoj 161
Gazetaro 144
Germana Demokratia Respubliko 36, 134, 216
Germanujo, Federacia Respubliko 13, 50, 53, 94, 96, 115, 170, 172, 176, 194

Goldsmith 68
 Grekujo 112, 216

 Haazen 171
 Himno de EEK 83
 Hindujo 214
 Hipioj 36
 Hispanujo 36, 196
 Hungara Kultur-Festivalo 38, 165
 Hungarujo 50, 73, 112, 115, 165, 170

 Indonezio 134
 Industrio 204
 Informado 7, 25, 28, 67, 93, 108, 123, 167, 182, 202
 Informejo 29, 49, 108, 109
 Institucio Hodler '68 102, 176
 Insulo de la Rozoj 13
 Interlingvistiko 214
 Internacia Libro-Jaro 2, 84, 109
 Interpretado 67, 172, 201
 Isakovski 171
 Israelo 136, 214, 216
 Italujo 13, 112, 115, 134

 Japanujo 13, 28, 32, 94, 96, 172, 196
 Jonas, F. 32, 112
 Jugoslavio 32, 115, 182, 209
 Junulara kongreso: vidu ĉe Kongresoj

 Ĵamboreoj 173
 Ĵurnalismo 135

 Kabe centjara 103
 Kalendaro 38, 98, 126, 200
 Kanado 183, 212
 Kaŭabata 94
 Kino 94
 Kolombio 32, 112, 170, 176
 Komenco bona – ĉio bona 15, 37, 57, 74, 97, 113, 137, 177, 197, 217
 Komerco 204
 Komputiloj 182
 Kongresoj:
 UK 57a, Portland 18, 41, 76, 96, 98, 141-155
 UK 58a, Beograd 122, 195
 UK 59a, Hamburgo 117
 IJK 28a, Toruń 69, 96, 156
 IJK 29a, Sarajevo 157
 Konkursoj:
 Belartaj 51, 155, 189, 194
 Oratora 152, 189
 Koreujo 50, 96, 112, 194
 Kosmo 135, 201
 Kubo 32, 73
 Kulturo 153, 165, 184
 Kursoj 4, 175 (vidu ankaŭ ĉe Televido)

 Laborplano 166, 210
 Landaj asocioj: vidu ĉe UEA
 Lapenna 112
 Lerneja Bulteno 52, 114, 175
 Lernejoj 121
 Leteroj 17, 34, 72, 95, 109, 133, 215

Lewine 171
 Libio 214
 Librovendado 215
 Limregionoj 215
 Lingva problemo 49, 51, 102, 122, 124, 141, 149, 162, 164, 172, 182, 183, 201, 202, 204, 208, 209, 212, 215
 Lingva Servo 53
 Lingvistiko 114, 175
 Lingvoj 83, 96, 104, 107, 122, 134
 Literaturo (vidu ankaŭ ĉe Eldonaĵoj)
 ĝenerale 3, 51, 152, 167, 171, 181, 194, 215
 "Al la maro" (Ueyama Masao) 188
 "Al la vento" (Tvarožek) 35
 "Jubileo" (Nedelčeva) 86
 "La legendo" (Szabó) 186
 "Paneo" (Harlow) 10
 "Sankta Francisko kaj la povraj judoj" (Wittlin) 189
 "Vojo kaj tempo" (Kořínek) 74
 Loke-Fake-Persone 13, 50, 72, 94, 112, 134, 170, 194, 214
 Luksemburgo 13

 Madagaskaro 51, 112, 194
 Manuskriptoj 215
 Medicino 114, 175
 Movado 1, 7, 28, 47, 61, 62, 101, 182

 Nederlanda lingvo 208
 Nederlando 4, 73, 134
 Nekrologoj 17, 95, 118, 134, 179, 194, Neŭtraleco 151
 Nov-Zelando 115, 116

 Oceanografio 33
 Oficiala informilo 19, 39, 59, 78, 99, 118, 139, 158, 179, 199, 218
 Okulkliniko en Afriko 8
 Olimpiado 13, 51, 171
 Ornitologio 112

 Paco 13
 Pakistano 162
 Paska Kultura Semajno 136
 Patentoj 209
 Pettyn 32
 Philips 204
 Pollando 115, 176
 Popović 205
 Por pli efika informado 25, 67, 93, 108, 123, 176
 Portugalujo 22, 134, 170
 Poŝtmarkoj 59, 211
 P.T.T. 94
 Pupteatro 12, 135, 209

 Radio:
 ĝenerale 51, 98, 133, 135, 145, 148
 elsendoj en 1972 10, 58, 77, 98, 118, 138, 178, 198, 211
 Recenzoj: vidu ĉe Eldonaĵoj
 Recenzo-kondiĉoj 9

Rezolucioj 102, 150

 Scienca Asocio Esperantista, Internacia 205
 Scienco 51, 79, 114, 175, 205
 Schmid 171
 Semajno de Internacia Amikeco 202
 Seminarioj 14, 55, 56, 116, 172, 196
 Sennaciismo 33, 171
 Skoltoj 14, 173
 Someraj Universitataj Kursoj 114, 175
 Soveta Unio 196
 Sporto 51, 171
 Stelo-mono 29
 Sudano 170
 Svane 94

 Tajpiloj 76
 Teatro 73, 135, 209
 TEJO 14, 36, 57, 69, 96, 116, 136, 151, 156, 172, 196, 216
 Televida kurso 4, 42, 58, 168
 Televido 145, 164
 Terminaroj: vidu ĉe Vortaroj kaj ĉe Eldonaĵoj
 Thomson 214
 Tito 122
 Tolstoj 128
 Tradukado 23, 79, 204, 211
 Transpaga problemo 72
 Turismo 51, 73, 94, 146, 149, 165
 Turkujo 4

 U.A.R. 33
 UEA:
 ĝenerale 65, 81
 delegitoj 34
 Estraro 81
 financo 81, 166, 198
 junulara sekcio 151 (vidu ankaŭ ĉe TEJO)
 Komitato 150
 laborplanoj 166
 landaj asocioj 166
 membro-statistiko 123
 UK: vidu ĉe Kongresoj
 Unesko 4, 5
 Universitatoj 202
 Unuiĝintaj Nacioj 4, 202
 Urugvajo 214
 Usono 13, 33, 51, 62, 73, 141, 148, 152, 154, 170, 194, 203

 Vegetarismo 112
 Virinoj 122
 Vjetnamujo 33, 51, 214
 Vojaĝ-informa Servo 34
 Vortaroj 171 (vidu ankaŭ ĉe Eldonaĵoj)

 Waldheim 112
 Werner 13
 Wüster 135

 Zamenhof, L.L. 58, 206
 Zamenhof, Stefan 215

Pilo-Eldonaĵoj

Periodaĵoj

Germana Esperanto-Revuo	13,— GM
Internacia Pedagogia Revuo	6,— GM
Pilo-Press, internacia inform-servo ĉiusemajna en Esperanto	20,— GM
Forumo, bulteno por internaciaj rilatoj	10,— GM
Esperanto aktuell, germanlingva revuo kvaronjara	3,— GM

Libroj

La mondpercepto de la modernaj natursciencoj	9,60 GM
Enkonduko en la libroskiencon de Esperanto, R. Haupenthal	3,50 GM
Esperanto Lingvo de la Sporto "Saluton amiko", R. Harry	4,— GM
Inversa vortaro de Esperanto, K. Schlueter	4,— GM

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Eldonejo,
D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113, FRG
Pčk. Nürnberg 819 56

ENTUZIASMIGE RAPIDA PROGRESO

eblas per tute nova,

COMPLETE SEVEN-DAY ESPERANTO COURSE FOR INTERNATIONAL CORRESPONDENCE (247p, 28cm, 1971)

Kial oni deziras malŝpari sian tempon sen ĉi tiu kurso? (Bonvolu legi recenzon en la maja numero de "Esperanto", 1972.)

Fidinda kurso kun tute nova, ekspresa instrumentado celas tuj ebligi internacian korespondadon. Krome, ĝi estas multe malsama, ol aliaj, pri la jenaj: 1) Gramatikaj reguloj, klarigitaj simple kaj nombritaj por tuja referenco; 2) Mnemonikaj (memorigaj) principoj de asociado kaj komparado, aplikitaj tra la libro; 3) "La Vortfinaja Tabelo pri Fundamentaj Vortoj", originale kontribuita de la aŭtoro; 4) Informmateriaĵoj, gramatikaj aldonaj kaj multaj aliaj.

Demandu kaj mendu ĉe:

Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.
Brita Esperantista Asocio,
140 Holland Park Avenue, London W11, Britujo.
Green Star Trading Company (eldonejo),
P.O. Box 8916, Portland, Oregon 97208, Usono.

LAŬTEMA VORTARO

Esperanto - Angla - Franca - Hispana. 27 200 vortoj en 4 lingvoj, 90 temoj, 234 p. 17 cm. Prezo: 10,20 gld.

Opinioj de recenzintoj:

"Ni varme rekomendas la Laŭteman Vortaron al ĉiu, kiu sincere deziras vastigi sian vortprovizon. "E.L.M. Wensing (revuo "Esperanto", UEA, marto 1972). "Jen libro, kiu estus ŝparinta al mi multajn horojn da laboro, se ĝi estus aperinta antaŭ jaroj." D.B. Gregor ("British Esperantist", aprilo 1972).



Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Trimonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"

faka kunlaboranta asocio de UEA

(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subtenanta 50; dumviva 300)

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO-FONDAĴO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esperanto de la Sanktaj Skriboj

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al
Administracio de Biblia Revuo (Pčk. 8/17852),
Piazza Duomo 4, I 48100 Ravenna (Italujo)

¿HABLA USTED EN ESPERANTO?



182 paĝoj, 17 cm. Plena baza kurso por hispanlingvaj memlernantoj, 20 lecionoj ilustritaj kun multaj dialogoj kaj 10 letermodeloj, plus literatura parto. La aŭtoro (Ergoto de Bonaero) permesas la tradukon kaj/aŭ adapton al ĉiuj lingvoj escepte de la hispana. Prezo: 6,06 gld.

Mendu ĉe UEA, ĉe via libroservo, aŭ rekte ĉe la eldoninto: Prof. Adan Hryniewicz, Argentina Esperanto-Instituto, C.C.58 (Suc. 12), Buenos Aires (Argentino).



Informas: Someraj Universitataj Kursoj, boŭte postale 9, B-4000 Liège 3 (Belgio)

La Monda Lingvo-Problemo

*Socia-Lingvistika-Politika-Jura
Psikologia-Ekonomika*

Vol. 4 (1972) N-ro 10

André ALBAULT, Etude statistique des langues
employées dans les revues médicales

Manfred MAYRHOFER, Zur Problematik der
Plansprachen

E. SVADOST, Filozofija i sociologija jazyka

W.A. VERLOREN VAN THEMAAT, Two meanings
of the term 'idiom'

Jan KNAPPERT, Language in education (recenzo)

R.P. NOGUEIRA, Babel & Antibabel (recenzo)

Reinhard HAUPENTHAL, Pri internacia lingvo —
dum jarcentoj (recenzo)

Eldono de Mouton sub aŭspicio de CED

Mendu per UEA

Jarabono (3 x 64 p.) kostas 25,— gld.

Ankoraŭ haveblaj: vol. 1 (1969), n-roj 1-3; vol. 2
(1970), n-roj 4-6; vol. 3 (1971), n-roj 7-9.

Nun aperanta: vol. 4 (1972), n-roj 10-12 (N-ro 10
jam aperis kaj n-roj 11 kaj 12 baldaŭ sekvos).

Jam akceptataj estas la abonoj ankaŭ por vol. 5
(1973), n-roj 13-15, kaj por la postaj volumoj.

El Popola Ĉinio

*Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage*

ABONTARIFO: 1 jaro £0,50 Kan.\$2,00 5,— gld.
2 jaroj £0,75 Kan.\$3,00 7,50 gld.
3 jaroj £1,00 Kan.\$4,00 10,— gld.

ABONU: Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj
aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-
Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Ĉiu abonanto por la jaro 1973, kiu
faros abonon antaŭ la 31-a de la
venonta januaro, ricevos belan
esperantan bild-
kalendaron.

